



Monata gazeto por la lingvo Esperanto.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugalaĵaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 ½.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duonpaĝa petittinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoneado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administracio: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarország (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

Ondoj de progreso kaj lingvo internacia.

Ĉiu homo iom klera kaj pensanta scias, ke la progreso de l' homaro iras malkonstante: ĝi, kiel ondo, jen leviĝas, jen malleviĝas. Diferenco konsistas nur en tio, ke la leviĝo de la progreso estas forta, rapidega kaj mallonga, — kaj la malleviĝo estas malrapida, malforta kaj tre longa. En la mondo aperas generacio de homoj progresemaj kaj poste aperas tuta vico da generacioj de homoj malprogresemaj kaj tiel plu. La homoj de la unua generacio vivas prefere per penso kaj sento. Ili atente rigardas la ordon de sia vivo kaj penas plibonigi kaj plenigi ĝin. Ili penas uzi la rezultatojn de la spirita vivo de antaŭaj progresemaj generacioj kaj al tiu ĉi spirita heredo penas aldoni la produktojn de sia propra spirita vivo. Ĉion tion ĉi ili penas enkonduki en la vivon kaj efektiviĝi ĉion bonan, akiri-

tan de la homara saĝo. La tempo de vivo de tia progresema generacio estas tempo de grandaj ideoj kaj grandaj aferoj. En tiu ĉi tempo la pulso de la homara korpo vive batigās, la koro de la homaro vivas per bonaj sentoj, la saĝo de la homaro vivas per grandaj, profundaj pensoj. Kiam do post progresema generacio de homoj aperas en la mondo vico da generacioj malprogresemaj, tiam la bonaj noblaj sentoj kaj grandaj, profundaj pensoj foriras sur la lastan lokon. La homaro preskaŭ tute forgesas ĉian bonan spiritan heredon de siaj antaŭuloj kaj vivas nur per mallarĝaj, malnoblaj intereso. Tiam la homaro fariĝas tute simila al porko, kuŝanta en malpura kota marĉaĵo, ĝuanta sian mizeran vegeton kaj profunde malestimanta ĉion, kio ne koncernas tiun ĉi ĝuadon. En tiu ĉi tempo grandaj ideoj estas ne forgesataj nur, sed eĉ malice mokataj kaj malfaltigataj. Ĉion, ne alportantan tujan ma-

terialan utilon, ian malaltan plezuron aŭ amuzon, oni profunde malamas kaj kalumnias. Anstataŭ kora kaj saĝa vivo, anstataŭ noblaj sentoj, altaj ideoj kaj grandaj aferoj aperas soifo de profito kaj plezuro, flirto, karta ludo, ĉikanado, diversaj sportoj kaj multa alia, konvena por homoj-bestoj. Malmultaj homoj de penso kaj sento en tiu ĉi tempo rapidas sin kaŝi en la izolecon kun la tuta heredo de siaj noblaj antaŭuloj, por eviti mokon kaj ofendon de la homoj-bestoj, kiuj en tiu ĉi tempo superregas en la mondo.

La nuna tempo, en kiu ni vivas kaj laboras, estas vere tia tempo de malleviĝo de la homara progreso, la tempo de homoj-bestoj. Tial ni ne devas miri, ke nia granda ideo, kiel ankaŭ multaj aliaj, similaj al ĝi, estas mokata kaj malestimata preskaŭ de ĉiuj. Kaj ni ne malĝoju pri tio ĉi kaj ne timu pri la sorto de nia afero: venos

iam la tempo de progresemaĵoj homoj, homoj de koro kaj saĝo, kaj nia granda afero tuj disfloros kaj rapide ekkreskos, kaj ĝia sukceso estos garantiita por ĉiam. Nur ni atendu kaj konstante laboru. Kaj ni ne ĵetu perlojn antaŭ porkoj, ne tro tedu al la nuna generacio de la homaro per nia afero, ĉar tiu ĉi generacio estas tute ne kapabla kompreni kaj subteni ĝin. La malmultaj homoj de koro kaj saĝo, kiuj ĉiam en ia kvanto ekzistas en la mondo, nepre aliĝos al ni. Ili helpos kaj subtenos nin. Kaj kvankam tiu ĉi helpo estos malgranda, sed tute sufiĉa por ke nia afero ne pereu. Ni nur devas konstante kaj fervore labori, por ke nia afero ne tro malfortiĝu kaj ke venonta progresema generacio de homoj ricevu de ni la eble plej grandan heredon kaj povu eble plej facile multoblige ĝin kaj eble plej rapide alkonduki nian aferon ĝis fino.

M. S. Rakitski.



BELA KNABINO.

Serba popola kanto.

Kion rigardas vi, rozo-knabino
Tiel dolĉete kun ama inklino?
Ĉu vi rigardas la pinon verdantan?
Ĉu la abion la bele-kreskantan?
Ĉu vi rigardas al mia frateto?

— Ho, vi junulo, vi, klara suneto,
Mi ne rigardas la pinon verdantan,
Nek la abion la bele-kreskantan,
Mi ne rigardas al via frateto:
Sed nur al vi, mia amo-suneto.

MIAJ PLENDOJ.

Kroata popola kanto.

Plendoj, plendoj miaj,
Vi ne estas tiaj
Kiel la aliaj;
Ha, vi tiom pezas
Ke se nur dekonon
Ĵetus mi sur ŝtonon,
Restus nur pecetoj
Kiel papaveroj!

Tradukis

Fr. Lourenço kaj A. Kofman.



SEN PREZENTO.

Rakonto.

Se Will Harding ne havus dunaskitan fraton, li estus ekstreme mirigita, kiam la knabino alparolis lin en la vagonaro, ĉar li estis certa, ke li neniam vidis ŝin antaŭe, kaj ŝi ne elvidis tiel, ke ŝi povus esti forgesata. Sed lia konfuzebila simileco kun la frato komprenigis ŝian eraron.

La knabino estis la sola persono trovata en la vagono, kiam li envenis.

Ŝi estis meze longa, ĉarma kun blonda haro. Ŝi ekrigardis lin preterire, kiam li envenis, kaj enprofundiĝis poste ĉe sia gazeto. Dum li esploris ŝian profilon, ŝi levis la okulojn subite, renkontis lian rigardon, turnis sin afable al li kaj donis al li la manon.

— Kiel vi fartas? — demandis ŝi kore. — Estas agrable trovi konatulon. Mi vojaĝis kvar horojn kaj morte enuiĝis.

Harding renkontis la amikino de sia dunaskita frato kun la sama koreco, kiun ŝi mem montris.

— Mi miras, kie Ted renkontis ŝin? — pensis li. — Eble en Buxton dum la bansezono? Li sendube dancis kun ŝi.

— Vi povus ja almenaŭ diri, ke vi ĝojas vidi min, — daŭrigis ŝi.

Harding ridetis afable.

— Mi pensis pri vi ĵus antaŭ ol la vagonaro alvenis, mirante, ĉu ankoraŭ unufoje ni estus tiel agrable kune, kiel en la lasta fojo.

La knabino rigardis lin subŝerce kaj post tio ŝi kreviĝis en sonora ekrido.

— Jes, kiel scii?! — diris ŝi. — Ĉu vi memoras tiun belan vesperon sur la lago? — daŭrigis ŝi.

— Ĉu mi memoras ĝin! — diris li.

Li estis faronta rimarkon pri la ĝenerala karaktero de tiu vespero, kiam la knabino daŭrigis:

— Kiel la aĉro estis klara kaj malvarma, kaj kiel niaj glitiloj kurogis sur la glacio!

Harding ektiriĝis; li pensis, ke koncernus someran vesperon. Li ekdecidis lasi la knabino paroli mem.

— Kaj ĉu vi memoras la vesperon en la verando? — Ŝia voĉo ricevis konfideman tonfalon. — Estis tiel mallumo ke vi ne povis vidi miajn okulojn, kaj vi diris, ke ili estas bluaj, dum mi certigis, ke ili estas brunaj.

— Kiel mi povus tion forgesi? — diris Harding. — Sed vi ne sukcesis kredigi min; mi konis viajn okulojn tro bone.

Kaj li enrigardis en ilin.

— Se tio estas fakto, — diris la knabino, — kiel do okazis, ke vi ne rekonis min, kiam vi envenis la vagonon? Vi min rigardis ja tiel precize.

— Mi vidas tiel malbone, — balbutis Harding. — Mi estas tiel terure miopa, komprenu vi! Mi petas senkulpigon!

— Via klarigo faras al vi honoron, — diris la blonda knabino rigide; — kvankam ĝi estas malproksima de la vero. Sed mi povas servi al vi per unu pli bona. Vi neniam ĝis nun vidis min. Vi eĉ ne konas mian nomon. Vi vidis, ke mi estas en eraro pri vi anstataŭ iu, kiun mi konas, sed vi ne estis sufiĉe honesta por klarigi tion al mi. Mi vidis, ke vi estis necerta pri la lago, kaj tial mi provis vin per la verando. La verando kaj la

brunaj okuloj estis nur eltrovo de mia flanko — kaj de via.

Li ruĝiĝis kaj transigis sin kun indogo for en la angulon de l' vagoneto.

— Ho, fraŭlino, — Harding interrompis sin, embarasita ke li ne konas ŝian nomon.

La vizaĝo de la knabino ekklariĝis iom. Ŝi batalis kontraŭ rideto. La rideto venkis, kaj tiam Harding translokigis sin kaj sidiĝis apud ŝi.

— Mi petas senkulpigon, — diris li humile. — Se vi ne volas aŭdi mian klarigon, mi foriros. Videble vi supozis en mi vian amikon, sinjoron Harding. Nu, mi *ne* estas Harding. Aŭ almenaŭ *ne via* Harding.

— Pri tio mi estas plene certa, — respondis la knabino.

— Mi volas diri, ke mi ne estas tiu Harding, kiel vi kredis. Mi ne estas mi mem, vi sciu; mi estas mia frato.

— Kiu vi estas do, ĉar vi ne estas via frato? — demandis ŝi.

— Mi estas Will Harding, — klarigis li, — kaj tiu persono, kiun vi renkontis antaŭe, estas mia dunaskita frato Ted Harding. Li estas mia similaĵo, kaj oni ne povas diferencigi nin unu de la alia. Tiaj eraroj kiel tiu ĉi okazis jam pli frue. Ni estas ambaŭ tiel kutimigitaj pri tio, ke ni neniam korektas ilin. Ni, tiel diri, envivigis la rolon.

— Vi devis ne subtrompi min, — diris la knabino. — Tuj, kiam vi komencis paroli, mi ekrimarkis, ke neniam antaŭe mi renkontis vin.

Ŝiaj okuloj brilis pro ruzoŝerco.

— Se mi ne diris ĝin sufiĉe, mi petas ankoraŭ unufoje pri pardono.

— Ĝin mi konsentas al vi, — diris la knabino. — Sed vi ne meritigas ĝin.

— Mi konfesas, — diris Harding. — Tio ĉi sendube estos leciono por mi. Vi sciu, mi neniam malsukcesis antaŭe. Ted kaj mi konfidis unu al la alia ĉion, ĉu grandan aŭ malgrandan — tiel se ni svatas knabinon, kiel se ni pruntas unu frankon de amiko.

— Volu transdoni al mi mian sunombrelon, — diris la knabino subite. — Jen mi elpaŝos.

— Jam! — ekkriis Harding disrevigite. — Kaj vi ne diris al mi ankoraŭ vian nomon.

Ŝi ruĝiĝis ĝis sub la haro.

— Vi povos ja demandi de — Ted, — diris ŝi, reregardante en la pordo.

* * *

Kiam Harding revenis al la loko, kie ŝi estis sidinta, li trovis ŝian naztukon sur la planko. En unu angulo estis brodita la monogramo „E. L. D.“

— Ted, — diris li post du-tri tagoj, — ĉu vi konas knabinon, kies komenciliteroj estas „E. L. D.“?

— Elsie Davis? — demandis Ted.

— Ne do! — diris Will; — ŝi havas ruĝan haron.

— Ethel Dubois, — proponis Ted.

— Nigran haron ŝi havas kaj nigrajn okulojn, — diris Will. — Tiu, pri kiu mi parolas, estas blonda. Ne tro blonda, ne pala, sed ŝi havas blondan helan haron kaj blujajn okulojn.

— Vi estas sendube en granda danĝero, — diris Ted komplate.

— Vin ne enmiksu, — respondis Will, kaj tiel ili disiris.

..... La mondo ne estas vasta, kaj sekve ne estas tre strange, ke Harding renkontis ankoraŭ unufoje la blondan knabinon. Tio okazis en balo sur bieno ie en

la provinco. Ŝi trovis sin staranta en unu fino de granda salono, kiam li unue ekvidis ŝin. Li estis interparolanta kun persono apud si, sed li interrompis sin tuj demandante:

— Kiu estas la blue vestita knabino, jen ŝi kun la blonda haro?

— Eleonor' Davenport, — fariĝis la respondo; — ĉu vi ne konas ŝin?

— Volu prezenti min al ŝi, — petis li.

Sed ĵus en tiu sama momento iu alia pretendis la atenton de lia apudstaranto, kaj kiam la bordo estis ree libera, tiam fraŭlino Davenport estis malaperinta el la vido de Will Harding.

Kiam lia frato Ted kelkajn momentojn poste iris tra la salono, li sentis subite, ke mano tuŝetas lian brakon. Estis fraŭlino Davenport.

— Mi deziras paroli kun vi unu momenton, sinjoro Harding, — diris ŝi.

Ili estis haltintaj proksime al palmgrupo, fraŭlino Davenport facilmove enŝteliĝis post ĝin kaj igis Harding sekvi ŝin.

— Mi esperas, ke vi bone komprenas min, — diris ŝi ruĝiĝante ĝis sub la haro, — sed mi devas rakonti, kiamaniere okazis. Ne estas pro tio, ke mi sentus min ĝenata renkonti vian fraton, sed ĉar mi hontas pro mi mem. Ĉu vi volas kredi min laŭ mia parolo?

— Kompreneble, — diris Harding, — mi kredas ĝin, ĉar vi ĝin diras, kvankam mi ne komprenas, pri kio vi parolas.

— Ĉesigu moki min, — diris ŝi. — Estas terure eldiri ĝin . . . sed . . . mi neniam vidis vian fraton.

— Pro tio vi ne malesperu, — respondis Harding. — Pripensu, se, anstataŭe, vi neniam estus vidinta min.

— Tio ĉi estas tro serioza por ŝerci pri ĝi, — rediris fraŭlino Davenport. — Vi

komprenu, la afero tiel rilatas, ke mi estis vojaĝinta kvar horojn kaj ne sciis kion entrepreni. Mi provis legi, sed la legado kaŭzas al mi kapdoloron. Mi morte enuiĝis kaj . . . kaj precize tiam vi envenis la vagonaron. Kion vi diris?

— Nenion, — respondis Harding. — Volu daŭrigi!

— Nu, ŝajnis al mi esti domaĝe, ke mi enuiĝus kaj ke vi enuiĝus, tial mi pensis, ke ni povus . . . povus . . .

— Povus kion? — diris Harding.

— Vi volas do nepre ne helpi min, — diris ŝi. — Se ni ne estus tiel konvendonutaj . . . se ni estus infanoj . . . ĉu vi komprenas? . . . tiam ni estus povintaj interparoli tute nature kaj amuziĝus ambaŭ kaj forgesus la enuiĝon.

— Mi komprenas, — diris Harding.

— Kaj sekve mi pensis: se mi ŝajniĝus, ke mi eraras kaj kredas, ke mi konas vin! Kaj vi scias, ke mi faris la provon. Sed vi estis tiel malsaĝa . . . — ŝiaj okuloj ekfulmis. — Vi estis tiel maltrankvila, ke vi ne povus ludi vian rolon, kaj vi ludis ĝin eksterordinare malbone. Kaj kiam vi poste faris viajn konfesojn kaj senkulpigojn! Sed mi ne povas eldiri, kiom mi pentis, kiam mi estis enkondukinta vin en tion, kaj mi faris al mi la promeson, ke, se mi denove renkontos vin, mi konfesos ĝin al vi. Mi estas sincere malĝoja pri tiu afero. Ĉu vi volas kredi min?

— Mi ne scias, — diris Harding solene, — vi subtrompis min unufoje, vi pensu!

— Sed mi neniam tiel agis antaŭe! — petis ŝi moligante. — Kaj mi tiom enuiĝis!

— Vi pereigis miajn revojn, — diris Harding melanĥolie. — Vi detruis mian kredon je la homo . . . je la vi-

rino mi volas diri. Kion vi kredas ke dirus via patrino?

— Mi neniam rakontos ĝin al ŝi.

— Tion mi kredas bone. Sed kion ŝi diros, se mi rakontos ĝin al ŝi?

— Tion vi ne volas!... Tion vi ne povas!

— Mi ĝin faros, se vi ne donas al mi rekontentigon.

— Mi kapitulacas je kompto. Kiaj estas viaj kondiĉoj?

— Vian daneprogramon kun tiom da dancoj, kiom mi volas.

— Tion mi konsentas.

— Ni vidu! La unua — kaj —

— La unua estas antaŭe forpromesita.

— Ne kun mia konsento. Sed estu! Mi cedas la unuan kaj prenas la duan kaj la kvaran.

— Ha-lo', Ted! — diras voĉo intime preskaŭ en la oreilon de miss Eleonor'. — Vi ne retenu ĉion por vi sola. Volu prezenti min, se fraŭlino Davenport permesas. Ni jam antaŭe kunparolis sen prezento, sed mi tre volus, ke ĝi fariĝu, tiel ke mi plej humile kuraĝus peti pri ia danco.

Eleonor' Davenport levis sian rigardon.

Tiu viro, al kiu ŝi faris sian konfesion, kaj tiu ĉi noveveninta estis tiel similaj unu al la alia kiel du beroj. Ŝi rigardis de unu al la alia.

— Ĉu estas via intenco diri, ke vi estas tiu, kiun mi renkontis en la vago-

naro? — eldiris ŝi fine kun ekscitita voĉo al la lasta.

— Mi havas la honoron.

— Kaj vi — Eleonor' turnis sin kontraŭ Ted. — Ĉu vi kuraĝas nomi vin gentleman? Donu al mi mian danceprogramon! Vi estos punata!

— Ne senigu de mi la dancojn! — petis la kulpanto. — Mi preferas kion ajn alian!

— Vi ricevos tiom da dancoj, kiom via frato juĝos vin inda, — diris Eleonor'.

— Mi donas al vi unu, kara Ted, — diris Will ŝirmule. — Por mi mem mi estas dankema, se mi ricevos la duan, fraŭlino Davenport.

Pli malfrue en la vespero, kiam ili transsidadis la lastan valson, diris Eleonor':

— Ĉu ci ne pensas, Will, ke ni devas serĉi cian fraton kaj sciigi al li la sekreton? ... Li estis terure malica, sed tamen ...

— Tio tute ne estas rapidinda. Ted'on ni sufiĉe baldaŭ trovos. Mi sentas min tre kontenta tie ĉi sen li.

— Sed mi pensis, — diris Eleonor' kun ŝercema ekbrilo en la bluaj okuloj, — mi kredis, ke vi ambaŭ ĉiam sciigas unu al la alia, kiam vi — svatis knabinon.

Will Harding ektenis ŝian manon inter ambaŭ siajn.

— Tio estas nur kiam ni ricevis rifuzon, — diris li.

Tradukis P. Nn.



La du reĝinfanoj.

El antikva orient-friza idiomio.

Du reĝaj infanoj sin amis,
Reĝulofilin' kaj reĝid',
Sed l' akvo profunda, ĝi estis
Kontraŭa je l' dolĉa kunvid'.

„Amata, vi scias bon-naĝi,
Transnaĝu kaj venu al mi,
Ĉi-tie dum nokto la torĉo
Lumigos la maron al vi.“

Sed al tiu lok' monaĥino
Ŝteliĝis kun nigra perfid',
Ŝi nokte la torĉon estingi-s,
Kaj dronis l' amata reĝid'.

Kaj la reĝfilino, ŝi diris:
„La kor' tre doloras al mi,
Mi iros, patrin', al la bordo,
Min pikas enu' tie ĉi.“

„Tre bone, sed sole ne iru
La bordon en tiu ĉi hor',
Vi veku la junan frateton,
Li iros kun vi, mia kor'.“

„Ho ne, mia juna frateto
Li estas sovaĝa tedul',
Li pafos la belajn birdetojn,
Sidantajn ĉe l' akva spegul'.

„Se la ne-sovaĝajn li pafos
Kaj la sovaĝar' flugos for,
(L' infano de l' reĝ' tion faris.)
Dirados la homoj en ĥor'.“

„Amata, mi petas, ne iru
Izola sur tiu ĉi voj',
Vi prenu la junan fratinton,
Kaj ŝi kun vi iros kun ĝoj'.“

„Ho ne, mia juna fratino,
Ŝi estas petola sen fin'
Kaj ĉiujn floretojn de l' bordo
Difektos, amata patrin'.

„Se velkos la ruĝaj, kaj restos
Nur floroj de blanka kolor',
(L' infano de l' reĝ' tion faris,)
Dirados la homoj en ĥor'.“

L' edzino de l' reĝ' iris preĝi,
L' alia ne preĝis al Di':
Ŝi iris malĝoje je l' bordo,
La kor' tre doloris al ŝi.

Fisisto, ho bona fisisto,
Vi vidas, min premas malsan',
Vi povas, vi devas min helpi,
Enĵetu la reton, maran'.

„En tiu ĉi loko mi perdis
La plej adorindon de l' kor',
Eltiru vi mian amaton,
Mi vin rekompencos per or'.“

„Por vi mi laboros plentagon,
Mi oron ne volas de vi.‘‘
Li ĵetas la reton kaj vidu —
La filo de l' reĝo en ĝi!

„Vi prenu ĉi-tion, fiŝisto,
 Por via feliĉa labor',
 Jen mia kronet' diamanta,
 Jen mia kolĉeno el or'.“

Ŝi al si premegis l' amaton,
 Lin kisis kun larma humor',
 „Ha, buŝ', se vi povus paroli,
 En mi tuj saniĝus la kor'.“

Ŝi premis lin al sia koro,
 La kor' tre doloris al ŝi, —
 Ŝi plue ne povis jam vivi,
 Kaj saltis en l' ondojn kun li.

Tradukis

G. Schroeder kaj A. Kofman.



TRIOLETO.

Mi tage du blujn okulojn admiris,
 Kaj nokte mi sonĝis bluecon de mar',
 La mar' min dronigis kaj tiris min, ĉar
 Mi tage du blujn okulojn admiris.

Sed post la vekigo de l' nokta erar'
 Mi vidis: ne maro, — l' okuloj min tiris,
 Kaj tiu ĉi tiro altiris min, ĉar
 Mi tage du blujn okulojn admiris.

Amiko.



L' AMATINO.

Vin sole mi vidas
 En bela la flor',
 Vi ĉie et-ridas
 Al mi, am-trezor',
 En mosto de l' vino,
 En dolĉa la vent',
 En ĉio nur sent'
 Pri vi, amatino!

Ĉe l' bru' de l' zefiro
 En verda foli',
 Ĉe l' sono de l' liro
 Vin aŭdas nur mi.
 Simile al Dio,
 En tuta natur'
 Jen via figur'
 Pentriĝas en ĉio.

L' animoj foriras
 Laŭ voka la kri'
 De l' mort' kaj akiras
 Ripozon ĉe Di',
 Kaj for rapidiĝas
 Rivera la ar',
 En stern' de la mar'
 Ĝi baldaŭ ĵetiĝas.

Sed vane sopiros
 Mi ĉiam je vi,
 Ĝemante mi iros
 Sur ter' tie-ĉi.
 Mi vin kiel stelon
 Nur vidos, diin',
 Atingos ĝis fin'
 Neniam la celon.

Tradukis

Sig. Agrell.



LA PASINTO.

Hanovera idiomo.

Proksima je l' sepdeka jar',
Mi estas tamen sen griz-har',
Bonvidas la okuloj,
Per dentoj kvazaŭ el granit'
Mi manĝas kun bon-apetit'
Simile al junuloj.

Mi manĝas kiel jun-person',
Mi iras sen apog-baston',
Dolĉafojn bon-digestas,
Mi trinkas brandon po glaset',
Mi ĝojas je gaj-societ',
Kaj en la dorm' long-restas.

Nur unu malĝojigas min:
Min plu ne amas l' ar-knabin',
Mi kiel orfo restis.
Ha, ili kuras for de mi!
En la pasinto ili pli
Volonte ĉe mi estis.



EL HEINE.

VI ESTAS ĈARMEGA KAJ BELA
KAJ PURA SIMILE AL FLOR',
MI VIN RIGARDADAS KAJ VEO
ŜTELIĜAS EN MIN EN LA KOR'.

KAJ ESTAS AL MI KVAZAŬ PREĜE
MI METIS LA MANOJN AL VI,
KE SAME ĈARMEGA KAJ BELA
KAJ PURA KONSERVU VIN DI'.

Tradukis

G. Schroeder kaj A. Kofman.



NORDLANDO.

Sveda nacia kanto.

Verkis RICHARD DYBECK.

Vi freŝa, multaĝa, vi alta nordrand',
Vi gaja, silenta, ho vi bela!
Mi al vi salutas, al vi, rava land',
Al via verd-herbej' kaj sun' ĉiela.

Vi tronas sur granda antikva memor',
Ehinta kun glori de bord' al bordo,
Vi estas kaj restas kun sama la glori.
Ke vivu mi kaj mortu en la nordo!

*Por la verko „Voĉoj de l' popoloj“, kiun
intencas eldoni s-ro A. K., tradukis*

Rolf Nordenstreng kaj A. Kofman.



La hejma sopiro de Norrlandano. *)

El sveda verkisto **Elias Schistedt**.

Vi al la patruj' resopiras, ho kor'
Kaj frapas kun plenda sufero,
Ĉar pentras al vi de l' knabee' la memor'
La valojn de via hejntero.
Vi pentas je l' flama dezir', kiu vin
Fortiris fremdujen kun trompa inklin'
De l' hejmaj arbaroj kaj valoj.

Mi ĝojis je l' hejma tondranta river',
Je l' monto, de nuboj kronita,
Je l' pura lageto kun gaja border',
De l' verda arbaro zonita;
La viv' tie fluas kun paca ridet'
Ĉe l' brilo de l' sun', dum la kant' de turdet'
En hejmaj arbaroj kaj valoj.

Ho, kion vi serĉis sur tiu ĉi bord'
En la malproksima fremdujo?
Ĉu korojn? Ĉu ilin ne havas la nord'?
Ĉu mankas fratam' je l' patrujo?
Nu, kio de l' songoj rezultis al vi?
Ĉu vidis vi sude mankanton ĉe ni,
En hejmaj arbaroj kaj valoj?

Jam dormas la patro de mi ĉe la mar',
Lin apud la bordo lulanta;
Kaj ĉirkaŭ la tombo — betula branĉar'
Lin ombas per ŝildo verdanta.
Sed mia patrin' kaj l' amikoj de mi
Min logas, min vokas, min tiras al si,
Al hejmaj arbaroj kaj valoj.

Mi iros, mi venos de l' sudo al vi
Por premi vin al mia koro,
Sed — eble ĝi estos malfrue, kaj mi
Nur staros ĉe tomboj kun ploro?
Starados tut-sola en tiu ĉi mond'.
Kun plend', sen ricevo de kara respond'
En hejmaj arbaroj kaj valoj? . . .

*Por la verko „Voĉoj de l' popoloj“
tradukis*

*) Norrland = la norda duono de Svedujo.

Rolf Nordenstreng kaj A. Kofman.



N I A L A N D O. *)

De la svedlingva finna poeto

J. L. Runeberg.

Ho, patra land', amata ter',
 Sonegu, kara vort'!
 Nenia val', nek bord' en ver'
 Etendas sin sub la eter',
 Ravanta pli, amata pli
 Ol la patruj' de ni.

Por ĉia amantul' de or'
 Malriĉas nia land',
 Fremdul' ĝin vidas sen favor'
 Sed kun la laŭta bord-sonor'
 Kun marĉoj, kun pinar' — al ni
 Orlando estas ĝi.

La bruo, plena je mister',
 De la mallum-arbar',
 La sonetad' de l' ar-river'
 La stela nokt', la bel-somer',
 Ni ĉion amas, amas ĝin
 Kun tuta kor', sen fin'.

Batalis tie ĉi kun glor'
 La patroj antaŭ ni
 Per penso, glavo, plug-labor':
 Ĉi-tie en la Finna kor'
 Sentigis ĝojo kaj prosper',
 Feliĉo kaj sufer'.

Nemezureble estis ĝi
 La sanga batalar',
 La suferad', turment-legi',

La batoj de la frost-furi',
 La disversita sanga mar'
 El ni, el la Finnar'.

Ho ve, fluegis sang' en ĝi,
 En ĝi kaj por ĝi, jes!
 En ĝi brilegis ĝoj-radi',
 En ĝi plendegis l' agoni'
 De l' avoj, kiuj antaŭ ni
 Vivadis tie ĉi.

Ĝi estas al ni dolĉa don'!
 Okazu kio ajn —
 Ĝi restas ĉiam nia bon',
 La hejm', la patra region',
 Ĉu io ravas pli, en ver',
 Ol ĝi, la patra ter'?

Jen ĝi, jen ĝi! — rigardu ĝin —
 L' amata kara land'!
 La man' al ĝi direktas sin,
 Jen la lagar', jen l' aro-pin',
 Jen niaj montoj, nia bord'.
 Jen nia patra Nord'!

Se oni nin kondukus for
 Al ora sorĉa nub',
 Se nia viv' fariĝus glor'
 Sen ia ĝemo de dolor',
 Ni tamen al ĉi-tiu ter'
 Sopirus kun sufer'.

*) La nacia himno de Finnlando.

Ho lando, lando de lagar',
De kantoj kaj de ver',
Ho, bordo de la viva mar',
De l' pasintar', de l' estontar',
Sen timo kontraŭ la malriĉ'
Vivadu en feliĉ'!

Florado via el l' embri'
Disvolvos riĉe sin,
La lum', la ĝoj', l' esper' de vi
Eliros el la am' de ni,
Kaj pli laŭtigos en l' aer'
La kant' de l' patra ter'!

Por la verko „Voĉoj de l' popoloj“

tradukis

Rolf Nordenstreng kaj A. Kofman.



LA VIKINGO.

El la sveda verkisto

ERIK GUSTAF GEIJER.

La dom' de l' patrin', ĉe l' dekkvina jar',
Fariĝis malvasta al mi,
La tag' al mi longis ĉe l' gard de l' ŝafar',
Kaj premis min melankoli',
Mistera songado ne lasis min for,
Min kaptis enu', plu ne ĝojis la kor'
En l' arbaro.

Mi kuris sur l' altajn montegojn ĉe l' bord'
Kaj ĝuis la vidon de l' mar',
Kaj sonis al mi kun ravanta agord'
La kant' de l' ŝaŭmanta ondar'.
L' ondar'o, ĝi venas de la malproksim',
Libera de ĉenoj, libera de tim'
Sur la maro.

Jen foje ŝipeg', pli rapida ol vent',
Alkuris al nia bordstri',
Kaj tuj mian koron traigis ĝoj'sent':
Jen, jen kio mankis al mi.
Mi kuris de l' ŝafoj kaj de la patrin'
Al tiu vikingo, — mi estis al fin'
Sur la maro.

La vento bategis al nia velaĵ',
Ni flugis sur l' onda dorsar',
Kaj antaŭ ni dronis la monta supraĵ',
Mi ĝojis je l' ludo de l' mar'.
La patra glaveg' en la man', kun pasi'
Mi ĵuris akiri regnegon al mi
Sur la maro.

Mi buëis la estron post paso de l' jar':

Li bojis min — „mola timul“,

Mi tiam fariĝis vikingo de l' mar'

Kaj reĝis je ar-militul'.

Mi gajnis kastelojn ĉe l' bordoj de l' mar',

Lotumis l' akirojn kun mia virar'

Sur la maro.

Ni festis la venkojn per dolĉa la vin',

Ni regis de ondoj sur land',

La sort' min gajigis per jun-virgulin'

Kaptita de l' bord' de Valland*)

Ŝi ploris tri tagojn, sed ĉesis al fin',

Kaj jen mi edziĝis je l' bela virin'

Sur la maro.

Por kelke da temp' min detiris la bord'

De l' ondoj, de mara la vent':

Mi regis landanojn kaj zorgis pri ord'

En dom', post riglil', sub tegment',

La vintro, ĝi estis longega, sen fin',

De l' tero malvasta min logis reklin'

Al la maro.

Mi perdis la ĝojon de mia ekzist',

Helpante al ĉia timul':

Mi estis ja mur' por la ter-laborist'

Kaj sako por la almozul',

Min tedis la punoj por ŝuld', malobe',

Por ĉia malsaĝ' — ha, se estus mi re

Sur la maro!

Forpasis la vintro, kaj jen sur la bord'

Aperis jam anemonar',

Resonis de l' ondoj kun dolĉa agord'

La kant': al la mar', al la mar'!

Kaj ludis la spir' de l' printemp' en la voj',

Kaj kuris sen lac' la riveroj kun ĝoj'

En la maron.

Min forte rekaptis l' antaŭa pasi',

Min tiris la onda sonor',

Mi jetis malŝate la monon de mi

Kaj rompis la kronon el or';

Malriĉa, kun glav', de la lauda klimat'

Mi kuris, vikingo, al la nesciat'

Sur la maro.

Liberaj simile je l' vent' de l' aer'

Ni flugis sur l' ondoj de l' mar'.

Mi vidis la vivon de l' hom' sur la ter':

Ĝin vipas sen halt' la zorgar',

Nur de la vikingo forkuras malĝoj',

Ĝi timas nin, kuras de ni, de la voj'

Sur la maro.

Kaj re sur la ŝipo, por plua batal'

Ni tranĉis la spinon de l' mar',

Ĉe l' vid' de viking' tuj ruĝiĝis la ŝtal',

Indulg' nur al komercistar':

Ni lasas la vivon al l' anoj de val',

Ĉar sole vikingoj sin taksas per ŝtal'

Sur la maro.

*) La antikva skandinava nomo de Francujo.

Starinte ĉe l' stemo*) dum taga la bril',
 L' estonto vidiĝis al mi,
 Simile al eigno la ŝip' en trankvil'
 Portiĝis sur l' ond' kun graei',
 Mi estis riĉulo, en ĝoj', en liber'
 Kaj plena je nelimigita esper'
 Sur la maro.

Sed nokte aŭdiĝis al mi la teksad'
 De l' nornoj**) tra l' nigra vual'.
 La sorto similas je l' onda fluad':
 Ĝi levas sin nur por la fal';
 Pli bone, se oni, estante en voj',
 Pretiĝas egale al ĝoj' kaj malĝoj'
 Sur la maro.

Ĉe l' jaro dudeka nun volas la mar'
 La sangon de mi, de l' viking',
 Ĝi konas ĝin bone, dum la batalar'
 Ĝin glutis la onda laring'.
 La koro flamanta, pli firma ol rok'***),
 Tuj kuŝos malvarma sub tiu ĉi lok'
 En la maro.

Sed mi, mi ne plendas je l' viv' sur la mar',
 Mallonga, sed plena je glori',
 Mi iros tuj al la salon' de l' diar',
 Mi venos al ĝi kun honor'.
 Funebre la ondo kantadas al mi,
 Mi vivis kaj nun entombiĝas en ĝi,
 En la maro.

Ĉe l' ŝiprompaĵaro tiele sur rok'
 Kantadas vikingo ĉe onda la vok'.
 Glutata de l' mar' li estas.
 Kaj ree tondradas la onda sonor',
 Kaj vento flugas kun luda fervor';
 Sed la glori' de l' viking' — ĝi restas.

Por la verko „Voĉoj de l' popoloj“ tradukis

Rolf Nordenstreng kaj A. Kofman.

*) Angle: stem, fr.: étrave, germ.: Steven (antaŭstemo = kunligitaj traboj, formantaj la antaŭaĵon de ŝipo.

**) La diinoj de l' sorto (Urdr, Verdande kaj Skuld, — l' Estinto, l' Estanto kaj l' Estonto).

***) Roko = ŝtonego.



DU RENKONTIĜOJ.

Rakonto.*)

Ivan Andreiĉ Garin ekintencis veturi el la urbo en vilaĝon, por ĝui someran ripozon, post enua kaj ŝarĝa ofica laborado.

Li estis meza oficisto en malgranda gubernia urbo. Ĉiam sobra, akurata, laborema, sufiĉe klera kaj saĝa, li estis amata de sia estraro. Li baldaŭ atingis oficean lokon, tre bonan por lia 25-jara aĝo. Li havis tian salajron, kiun li eĉ ne povis tute elspezi: mankon de mono li neniam devis toleri. Li estis sana, gaja, bonkora, sufiĉe bela, kaj tial estis amata de la fraŭlinoj, kiuj opiniis lin kiel tre bonan fianĉon. Sed li ne rapidis edziĝi kaj eĉ tre malmulte pensis pri la fraŭlinoj. Li nur iafoje, en libera tempo, babiladis kun ili, ŝercis kaj gajis. Sed ĉio tio ĉi estis tute pura, virta, senriproĉa. Li elkreskis en bona, honesta familio sub senĉesa observado de lia patrino, kiu nun, post la morto de l' edzo, vivis en malproksima urbo, ĉe ŝia edzinigita filino. Unuvorte, Ivan Andreiĉ estis juna, sana, feliĉa en aferoj kaj trankvila en konscienco. Tial, la somero tiris lin el la griza malbonodora urbo en la verdan, bonodoran vilaĝon, sur la bruston de la naturo. Li skribis leteron al sia vilaĝa amiko kaj jam venis en la stacidomon, por preni fervojan bileton.

En la stacidomo estis ne multe da publiko: du oficiroj, kvar-kvin homoj de diversaj profesioj kaj ankaŭ deko da ju-

naj fraŭlinoj kaj fraŭloj, kiuj senĉese vagadis sur la platformo kaj, videble, tute ne intencis ien vojaĝi, sed venis tien ĉi nur pro senokupeco. Ivan Andreiĉ aliris al la bufedo, prenis botelon da frukta akvo, sidigis ĉe unu malgranda tableto kaj komencis trinki sian senkulpan trinkaĵon, rigardante la publikon. Interalie, li rimarkis tre junan kaj tre malriĉe vestitan homon. Tiu ĉi homo estis en tre ekscita stato. Li jen sidigis, jen sin levis kaj rapide vagadis en la ĉambro. La malĝojo kaj forta anima batalo estis vidataj sur lia pala, malgrusa vizaĝo. Ivan Andreiĉ komencis observi lin. Subite, la malriĉa junulo haltis en la mezo de l' ĉambro kaj ĉirkaŭrigardis la publikon, kvazaŭ elektante, al kiu aliri. Poste, li decideme iris al luksa kavaleria oficiro kaj komencis mallaŭte ion paroli al li. La oficiro mirante ekaŭdis la malriĉan junulon, males-time ridetis kaj sufiĉe laŭte diris al li:

— Mi neniam donas almozon al tiaj almozuloj, kia estas vi. Iru for.

La juna malriĉulo paliĝis ankoraŭ pli multe kaj iris el la ĉambro, mallevente la kapon kaj ŝanceliĝante kiel malsobra.

Ivan Andreiĉ tuj sin levis kaj iris post la junulo. Li atingis la junulon en la fino de la koridoro. La junulo staris apud la muro kaj viŝis larmojn per tuko. Ivan Andreiĉ tuŝis lin je l' ŝultro kaj afable demandis:

*) Tiu ĉi rakonto estas tute originala kaj skribite de mi rekte en lingvo internacia. Ĉu ne povas niaj amikoj traduki tiun ĉi rakonton en naciajn lingvojn kaj presi ĝin en naciaj gazetoj aŭ jurnaloj, kun rimarko, ke tiu ĉi rakonto estas originale verkita en Esperanto kaj presita en la „Lingvo Internacia“?

— Kio okazis kun vi, juna homo? Kial vi ploras?

La juna homo, videble, tre ekkoleris, ke ia fremda, bonevestita sinjoro rimarkis liajn larmojn, kaj maldelikate respondis:

— Kion vi bezonas de mi? Kion vi volas? Ĉu vi pensas, ke mi rakontos mian malĝojon al ĉiu renkontita homo, kiun mi antaŭe eĉ neniam vidis. Jes, mi provis fari tion ĉi, kaj jen, kion mi ricevis en rezultato. Tia bonevestita kaj kredeble riĉa sinjoro, kiel vi, ne ekvolis helpi al pereanta homo, kvankam tio ĉi kostus por li tiom, kiom al mi kostas kraĉi sur tiun ĉi plankon.

La juna malriĉulo kraĉis sur la plankon kaj kolere aldiris:

— He, vi grasiĝintaj sinjoroj! Vi trinkas la sangon de la popolo, kaj la graso jam tute kovris viajn cerbojn kaj korojn. Oni nomas vin kleraj, kulturaj homoj, sed vi estas senanimaj kulturaj bestoj, ĉerkoj koloritaj, pri kiuj parolas la Evangelio. Mi nun sufiĉe scias vin, inteligentulojn, kaj ĵuras, ke de nun mi neniam petos ian helpon de vi, kvankam mi mortus de malsato. Se mi havos ian bezonon, mi min turnos al simplaj vilaĝanoj, kaj ili sendube helpos min, ĉar ili estas multe pli bonaj ol vi, kvankam vi tiom malestimas ilin kaj tiom estimas kaj ŝatas vin mem.

Ivan Andreiĉ kuu bonkora rideto el-aŭskultis la tutan parolon de la juna malriĉulo kaj ree diris al li:

— Nu, mia kara, vi vane kulpigas la tutan inteligentularon pro la malbona ago de unu ĝia ano. Ĉie estas malbonaj kaj ankaŭ bonaj homoj. Kaj vi ankaŭ vane aligas min al grasiĝintaj riĉuloj, trinkantaj la sangon de la popolo. Mi estas simpla oficisto, ne malriĉa kaj ankaŭ ne riĉa.

Mi akiras al mi panon per laboro de miaj propraj manoj kaj mi ne havas multe da superflua mono, sed tamen mi sufiĉe havas, por fari malgrandan helpon al mia proksimulo. Vi diru al mi, en kio estas via malĝojo, kaj mi helpos vin, kiom mi povas. Vi ja petis helpon de oficiro, kiun vi antaŭe neniam vidis; kial do vi ne povas peti helpon de mi? Kaj mi helpos vin ne por tio, ke la rolo de bonfaranto plaĉas al mi, sed simple tial, ke la helpo mem estas agrabla al mia koro. Mi helpos vin kiel frato fraton, ĉar mi estas fortike konvinkita, ke ĉiuj homoj devas esti fratoj, ke la homa societo devas esti fondita ne sur reciproka „batalo pro ekzistado“, sed sur reciproka helpo kaj subteno. En tio ĉi, laŭ mia opinio, konsistas la plej ĉefa diferenco inter homoj kaj bestoj, kaj tion ĉi jesigas preskaŭ ĉiuj religioj. Rememoru unu lokon de la Sankta Skribo, kie estas skribita, ke la unuaj kristanoj havis ĉion komuna, kaj el la komuna have donis al ĉiu homo, laŭ lia bezono. Kompreneble, tio ĉi estas idealo, tre malfacile atingebla por ni, sed ĉu ni ne povas iom alproksimiĝi al ĝi?

La malriĉa junulo kaptis la manon de Ivan Andreiĉ, fortike premis ĝin kaj varmege diris kun tremanta voĉo kaj brulantaj okuloj:

— Kia bonega vi estas! Ĝis nun mi neniam renkontis homon, similan al vi. Se en la mondo estus iom pli multe da tiaj homoj, la mondo kaj la vivo estus tute aliaj. Jes, mi rakontos al vi mian malĝojon kaj volonte alprenos vian helpon, malgraŭ la ĵuro, kiun mi ĵus eldiris. Mia historio estas mallonga. Mi estas malriĉa studento de medicina akademio kaj veturas en S.-Peterburgon, por daŭrigi mian lernadon. Sed en la vojo kun

mi okazis malfeliĉo: mi ekdormis en la vagono kaj ia fripono forŝtelis mian monon kaj veturan bileton. Nun mi restis sen mono, sen bileto por la veturo, malproksime de mia urbo kaj ankaŭ malproksime de S.-Peterburgo. Krom tio, mi ne manĝis jam pli ol du tagoj kaj la malsato turmentas min. Kion mi nun faru? Mi ja ne povas, estante malsata, piediri centojn da verstoj*). Kaj, krom tio, se mi perdos multe da tempo en la vojaĝo, mi perdos la okupon, kiun mi havas en S.-Peterburgo, — kaj kiu donas al mi la eblon lerni en la akademio, ĉar mi tute ne havas iajn aliajn rimedojn kaj eĉ devas helpi al miaj maljunaj kaj tre malriĉaj gepatroj.

Kiam Ivan Andreiĉ elaŭskultis tiun ĉi rakonton, li eksentis, ke liaj okuloj estis plenigitaj per larmoj. Li deturniĝis, viŝis la okulojn per la tuko, prenis el sia poŝo monujon, prenis vizitan karton kun sia adreso kaj donis ĉion tion ĉi al la malriĉa junulo kaj diris:

— Prenu tiun ĉi monujon. Tie ĉi estas 35 rubloj**); ĝi estos sufiĉa, por ke vi alveturu en S.-Peterburgon kaj travivu la unuan monaton. Tie ĉi estas ankaŭ mia adreso. Kiam viaj aferoj pliboniĝos, vi resendos tiun ĉi monon al mi, aŭ simple ankaŭ donos ĝin al ia malriĉulo, kiu sin trovos en situacio, simila al via.

— Kiel! — ekkriis la junulo. — Vi donas al mi la tutan monon kaj eĉ kun la monujo! Ne, mi ne prenos de vi ĉion, kaj mi tute ne bezonas tiom multe da mono. Vi donu al mi nur 10—12 rublojn, ne pli multe.

— Prenu, prenu, kaj ne maltrankviliĝu pri mi. Mi estas ano de tiu ĉi urbo kaj havas ankoraŭ monon en mia loĝejo.

*) 1 versto preskaŭ = 1 kilometro.

**) 1 rublo preskaŭ = 2,50 frankoj.

Mi revenos hejmen, prenos monon kaj post kelke da horoj veturos en mian vojon. Prenu, prenu, kaj ne danku. Mi deziras al vi ĉion bonan.

Kaj Ivan Andreiĉ fortike ekpemis la manon de la feliĉa junulo kaj rapide foriris sur la straton.

*

Pasis du jaroj. En malgranda, malbela norda urbeto estis aŭtuno. La vetero estis abomena: la tutan tagon blovis forta vento kaj falis malgranda malvarma pluvo. La ĉielo estis griza kaj la tero estis nuda kaj nigra. Sur la stratoj kuŝis maldensa koto kaj grandaj profundaj marĉaĵoj. Estis tagmezo. Sur unu el la stratoj de l' urbo malrapide iris homo de meza aĝo. Li estis pala, malgrasa kaj vestita per ĉifonoj. Profunda malĝojo kaj malespero estis sur lia vizaĝo. Estis videble, ke li estis tre malfeliĉa. Urbanoj, renkontante lin, rigardis lin tre malamike. Kvankam tiu ĉi homo faris al ili nenion malbonan, sed ĉiuj sciis, ke tiu ĉi homo estas politika krimulo, forsendita en ilian urbeton sub observadon de polico. Ĉiuj sciis, ke la krimulo nun iras de l' poliestro, al kiu li devas aperi ĉiutage du fojojn.

Kontraŭ la krimulo iris sur la strato juna homo en uniformo de milita kuracisto. Pasante preter la krimulo, la milita kuracisto okaze rigardis lian vizaĝon kaj subite haltis, kvazaŭ li ekvidis ion tre malordinaran. La krimulo ne rimarkis tion ĉi kaj daŭrigis sian iradon. La milita kuracisto returniĝis, atingis la krimulon, atente rigardis lian vizaĝon kaj diris al li:

— Permesu demandi vin: se mi ne eraras, vi estas sinjoro Garin?

— Jes, mi estas Garin, — respondis malafable la mirigita krimulo.

— Ivan Andreiĉ?

— Jes, Ivan Andreiĉ. Kion do vi bezonas de mi?

— Kara Ivan Andreiĉ! ĉu vi ne rekonas min? Dio mia, Dio mia! En kia terura situacio mi vidas vin! Ĉu mi povis ekpensi, ke ni renkontiĝos tiel, kiam mi vidis vin junan, gajan kaj feliĉan. Kien malaperis ĉio tio ĉi?

— Mi ne konas vin. Kiu vi estas? Diru pli baldaŭ, kion vi bezonas de mi. Mi ne havas tempon stari sur la strato kaj vane frostiĝi.

— Mi estas tiu studento, al kiu vi iam donis monujon kun tuta via mono. Mi sendis al vi la ŝuldon per la poŝto, sed ricevis ĝin reen, ĉar oni ne povis trovi vin laŭ la adreso, kiun vi tiam donis al mi. Nun mi volas pagi al vi la ŝuldon. Kaj mi dankas Dion, ke mi renkontis vin, ĉar mia helpo por vi estas, videble, tiom ĝustatempa, kiom ĝustatempa estis via helpo por mi. Nun mi finis mian lernadon, havas bonan oficon, konvenan salajron kaj multe da konatoj. Unuvorte, mi estas feliĉa. Kaj jen mi devas nun zorgi pri tio, ke fari por vi ĉion, kion mi povas. Iru kun mi en mian loĝejon kaj rakontu al mi, kiel fariĝis tia granda ŝanĝo en via sorto.

— Mia historio, — diris malgaje Ivan Andreiĉ, — estas tiom mallonga, kiel via antaŭa historio, kiun vi rakontis al mi en la stacidomo; sed ĝi estas multe pli malĝoja, ol via, kaj nun mi estas tiom malfeliĉa, ke mi eĉ ne kredas bonan ŝanĝon en mia sorto. En tiu jaro, kiam mi kona-

tigis kun vi, mi konatigis ankaŭ kun ia homo, kiu estis membro de ia sekreta politika rondeto. Mi nenion sciis pri tio ĉi. Iu perfidis tiun ĉi rondeton, kaj ĉiuj ĝiaj membroj estis arestitaj. Estis arestita ankaŭ mia konato. En liaj paperoj oni trovis miajn leterojn, kaj tio ĉi estis sufiĉa por aresti min. Mi nenion sciis kaj en nenio estis kulpa, sed oni forsendis min tien ĉi, sub observadon de polico. Kaj jen, mi perdis la oficon kaj fariĝis politika krimulo, de kiu deturniĝas ĉiuj urbanoj. Mia maljuna patrino mortis de malĝojo, kiam ŝi eksciis pri la malfeliĉo, kiu atingis min. Nun mi vegetas en tiu ĉi abomena urbeto kaj sendube mortus de malsato, se mi ne ricevus ĉiutage de la polico malmulte da mono, per kiu mi povas aĉeti pecon da pano kaj iajn ĉifonojn, por vestigi mian konsumitan, malfortan korpon.

— Malfeliĉa Ivan Andreiĉ! — diris la milita kuracisto, apenaŭ detenante la larmojn. — Kiom multe vi suferis! Sed nun jam finiĝis viaj mizeroj. De nun vi vivos kaj ripozos en ĉia domo, kun mia familio. Mia edzino ekamos vin, ĉar se ne estus vi, ŝi ne estus mia edzino, kaj mi mem, sen via helpo, havus nenion el tio, kion mi nun havas. Kiam do vi estos tute libera, vi ricevos bonan oficon en komerca banko, en kiu estas direktoro mia bofrato. Nu, ni venis; jen estas mia loĝejo.

Kaj Ivan Andreiĉ vigle kaj gaje eniris en la pordon de bela loĝejo, ne dubante pri tio, ke lia amiko precize plenumos sian promeson.

M. S. Rakitski.



MIRINDAJRAKONTETO.

Ni estis relasintaj la stratojn mallarĝajn de l' urbo kaj paŝis sur piedvojo malproksima de homoj en la somervespero fulmotondrograveda. Super ni ekradiis la steloj per lumeganta brilo.

En la malproksimaĵo ekfulmis kaj malaltsonoranta tondrobruego eksonis al nia orelo.

La preĝeja sinjoro al mia dekstra flanko ne ekrigardis supren al steloj, ankaŭ li ne ekrimarkis la eklumantan fulmradion, kiu de tempo al tempo ekaperigis la grandegajn ŝtonegojn kaj arbarmontojn de la proksima montego en pala lumo.

Li nur vidis sian piedvojon kaj plendis pri la malforta kredo kaj pri la multaj eraroj, je kiuj li devis batali en sia preĝejkomunumo.

Parolante, la pasio estis kaptinta lin kaj liaj vortoj eksonoris kolerege, preskaŭ minacante.

„Ĉu ĝi ne devas provoki la punjuĝon eternan de l' ĉielo sur ĉiuj tielaj, kiuj aŭskultas la puran, nefalsigitan vorton de Dio kaj dubas kaj volas ŝanĝi en pensoj je tio ĉi? Estus pli bone, ke la mondo pereus, ol tia ĉi instruo religia!“

Mia akompananto ekrigardis al mi ekzamenante, kiel atendante mian konsenton.

Sed mi silentis kaj suprenrigardis al la milionoj da mondoj, kiuj staris en flamageanta skribo super niaj kapoj; kaj ĉe ĝiaj pacemaj radioj longe forgesitaj penetraĵoj el la malproksima juneco ekaperis antaŭ mia animo. Antikvaj mirindaĵrakontetoj trairis mian senton, kiujn mi, kiel knabeto, estis aŭskultinta de mia amegata patrineto. Ŝajnis al mi, kiel estus kaŝigita

en tiaj ĉi antikvaj mirindaĵrakontetoj ia feliĉo, prefere ĝojiganta la homan animon kaj kiel la malriĉa viro, kiu malhele rigardante antaŭen iris apud mi, ankoraŭ neniam estus ekkariginta tian ĉi feliĉon grandegan.

Li devis esti diveninta ion de tio ĉi, kio fariĝis en mi, ĉar li demandis min, ĉu io premis la koron al mi, kaj li petis min, konfidi ĝin al mi.

„Ĝi estas simpla mirindaĵrakonteto, althonorinda sinjoro,“ mi respondis, „sed granda vereco estas en tio ĉi por ĉia eterneco, kaj volonte mi volas rakonti ĝin al vi, se plaĉas al vi.“

„Vivis iam reĝo, kiu regis grandegan regnon. La reĝo estis la plej potenca estro en ĉiaj regionoj kaj neniu estis egala al li je potenco. Sed kiel ajn granda estis lia potenco, tiom pli granda estis lia bonvoleco kaj prudenteco, kaj per tio ĉi li direktis la grandegan regnon al bonfaro de la regnantoj. Sed tiuj ĉi malkonsentiĝis interalie kaj vivis en malpaco kaj disputo.

Ĉiu el ili imagiĝis esti prudentega kaj ĝustega kaj malsuprenvidis al la aliaj plena je malestimo. Ĉiu diris, por ke lia tuta faro ricevu preferan signifon: ĝi fariĝas „en nomo de l' reĝo“, kiu estus klariginta al li sian volon!

Kiam la reĝo estis aŭskultinta tion ĉi, li tuj venigis siajn regnantojn al si, kaj tre kolerege kaj potence eksonoris la vortoj de l' reĝo:

„Vi malprudentuloj, kiuj trouzas mian nomon kaj malsuprentiras ĝin en via disputo, ĉu vi imagiĝas servi al mi? Ne la plej malgrandan de miaj leĝoj vi povas kompreni tute kaj klare, kaj ĉu vi havas

la kuraĝon voli ekkoni mian plej internan esencon? Nun vi iru kaj konservu la pacon interalie kaj adoradu min pro miaj verkoj.“

La regnantoj ekfaris laŭ la vortoj de l' reĝo kaj vivadis plue en paco interalie.

La preĝeja sinjoro atentege estis aŭskultinta mian rakonton kaj li klinis nun komprenante la kapon.

„Belega mirindaĵrakonteto“, li diris, „se nur la homoj volus presi ĝin en la koroj!“

Silente ni iris longtempe unu apud la alia.

En la malproksimaĵo eksonis ankoraŭ ĉiam malaltsonoranta tondrego.

Mia akompananto eksopiris malgaje kaj murmuretis:

„Mi volus, ke mi ne estus forlasinta lin sen ia konsolvorto, la malriĉan Petron; nun ĝi estas tro malfrue.“

Demandante mi ekrigardis lin.

„La maljuna Petro, de kies enterigo mi venis hodiaŭ, estis veninta — antaŭ ol li kuŝiĝis — al mi, malkvietigita per liaj

duboj je kelkaj vortoj de l' sankta skribo. Ofte mi estis kolerinta al li pro tio ĉi — kaj ankaŭ estis kredinta agi per kruda vorto „en la nomo de l' ĉiupova reĝo“. En la nomo de tiu ĉi mi minacis nun la bedaŭrindan Petron per eternaj punoj, nomis lian malfeliĉon familian kiel la „punjuĝon de Dio pri li.“ — — Mi volus, ke mi ne tiel estus lasinta lin foriri de mi.“

„Nun li ĝin scias pli bone,“ mi diris mallaŭte.

La preĝeja sinjoro suprenrigardis al la eklumeganta skribo super niaj kapoj.

„Jes, nun li ĝin scias pli bone! — Amo, kiu lasas kolerigi sin, — amo, kiu povas ĉesi, — neniam estis amo!“

Longedaŭranta, solene sonoranta tondrobruego ekresonis de la montego.

Mia akompananto ekhaltis kaj prenis mian manon, kiel adiaŭ.

„Tie ĉi piedvojo gvidas supren al la dometo de Petro, — mi volas viziti la forlasitan, maljunan virinon tie supre.“

Ni disiris, — kaj pli klare ekŝajnis al mi la ora skribo en la supraĵo.

Tradukis el germana

D-ro Ad. Ebner.



LA PREĜO DE MARGARETO.

(El „Faust“ de W. Goethe.)

Suferulino,
Kun dolĉa klino
Konsolu min en la mizer'!
Kun glav' en koro,
Kun grand-doloro
Rigardas Vi je l' Fil-Ofer'.

Vi l' Patron petas,
Vi multripetas
Humilajn preĝojn kun sufer'.
Kiu scias
Kiel krias
La kor' de l' brust' de mi?

Kion mia koro sentas,
Kiel ĝi min multturmentas,
Vi ĝin scias, sole Vi!

Ha, ĉie sekvas min mizero,
Kaj la sufer', sufer', sufero
La bruston pikas kun obstin'.
Restante sola, ĉiaĥore
Mi ĝemas plore, plore, plore,
Kaj mia kor', ĝi rompas sin.

Mi malsekigis la kreskaĵojn
Per larva ar' de agoni',

Kolektadinte miajn florojn,
De mi portatajn nun al Vi.

Apenaŭ ekvekita
De l' hela sun-radi',
Mi ploris en la lito
Pro kora agoni'.

Ha, savu min de hont' kaj de mizer'!
Suferulino,
Kun dolĉa klino
Kompatu min en la sufer'!



LA KANTO DE MARGARETO.

(El „Faust“ de W. Goethe.)

L' antaŭa pac'
De mia kor',
Ĝi estas por ĉiam,
Por ĉiam for.

La vivo, ĝi estas
Tombej' sen li,
La tuta mondo
Antipati'.

Kaj liaj vortoj,
La vortoj-benoj,
La manpremad',
La ĉirkaŭprenoj!

L' antaŭa pac'
De mia kor',
Ĝi estas por ĉiam,
Por ĉiam for.

En mia kap' —
Nenia senc',
En mia koro
Malpotenc'.

L' antaŭa pac'
De mia kor',
Ĝi estas por ĉiam,
Por ĉiam for.

La koro volas
Al li, al li,
Ha, se mi lin havus
Kaj tenus ĉe mi!

Kaj kiskus lin, kiskus
Multkiskus lin,
Kaj sub liaj kisoj
Mi mortus al fin'!

Mi ĉe l' fenestr'
Atendas lin,
De l' domo kuras
Kun kora klin'.

Ha, l' alt-figur',
La bril' rideta,
Kaj de l' okuloj
La fort' sekreta!

Tradukis
A. Kofman.

Viva ĥronologio.

Rakonto de ANTON ĈĤĤOV.

La gastĉambro de la regna konsilisto (*conseiller d'état*) Ŝaramíkin estis kovrita per agrabla duonlumo. Granda bronza lampo kun la verda abajuro faras verdaj la murojn, la meblon kaj la vizaĝojn. Iafoje en la estingiĝanta kameno ekflamas bruletantaj lignoj kaj en daŭro de unu momento kovras la vizaĝojn per la koloro de ĉielruĝo, sed tio ĉi ne detruas la komunan harmonion de lumo. La komuna tono estas eltenata, kiel diras la pentristoj.

Antaŭ la kameno en la apoga seĝo, en pozo ĵus tagmanĝinta homo sidas mem Ŝaramíkin, neĵuna sinjoro kun grizaj vangharoj kaj molaj ĉielbluaj okuloj. Sur lia vizaĝo estas surverŝita la delikateco, la lipoj estas falditaj por la malgaja rideto. Apud liaj piedoj, eltirinte la piedojn al la kameno kaj etendante iafoje sian korpon, sidas sur la benketo vic-guberniestro Lópnev, brava viro de 40 jaroj. Apud la fortepiano klopodas la infanoj: Nina, Kola, Nadja kaj Vanja. El la iom malfermita pordo, kondukanta en la kabineton de sinjorino Ŝaramíkin, timeme trairas la lumo. Tie apud la skribtablo sidas la edzino de Ŝaramíkin, — Anna Pávlovna, — prezidantino de la komitato de sinjorinoj, viva kaj pikanta sinjorino en aĝo de 30 jaroj aŭ iom pli. Ŝiaj nigraj, vivaj okuloj kuras tra la nazumo sur la paĝoj de franca romano. Sub la romano kuŝas en malordo kalkula raporto de komitato por la pasinta jaro.

„Antaŭe nia urbo estis pli gaja,“ diras Ŝaramíkin, fermetante siajn molajn okulojn antaŭ la bruletantaj karboj, „nenia vintro

pasis sen alveturo de ia glora persono. Tie ĉi estis gloraj aktoroj kaj kantistoj, sed nun, krom la ĵonglistoj kaj gurdistoj neniu alvenas. Nenian estetikan plezuron... Ni loĝas, kiel en arbaro. Jes... ĉu vi memoras, via ekscelenco, tiun italan tragedian aktoron?... kiu estas lia nomo? Li havis nigrajn harojn kaj estis grandalta homo... ha, — Luigi Ernesto di Ruĝiero! rimarkinda talento. Post unu lia vorto la tuta teatro ekscitiĝas. Mia edzino havis grandan partoprenon en lia talento. Ŝi per siaj klopodoj liveris al li la teatron kaj vendis biletojn por 10 spektakloj. Li instruis ŝin en la deklamacio kaj mimiko. Li estis tie ĉi antaŭ 12 jaroj, aŭ ne... 10 jaroj. Anjo, kian aĝon havas nia Nina?“

„Naŭ jaroj,“ diras el la kabineto Anna Pávlovna. „Sed por kia celo vi demandas tion ĉi?“

„Bagatelo!... por iaj konsideroj... Iafoje veturis al ni ankaŭ bonaj kantistoj. Ĉu vi memoras tenoron Prilípĉin? Li havis belan eksterajon, blondajn harojn, esprimoplenan vizaĝon, manierojn de Parizano... Kaj kia voĉo, via ekscelenco! Mi kaj mia edzino per niaj klopodoj liveris al li salonon en la klubo, kaj li kantis al ni tutajn tagojn kaj noktojn. Li instruis mian edzinon kanti... Li estis tie ĉi, kiel mi memoras, en granda fasto (*grand carême*) antaŭ 12 jaroj... ne, pli ol 12. Anjo, kian aĝon havas nia Nadja?“

„Dekdu jarojn.“

„Jes, dekdu jaroj, oni devas aldoni ankoraŭ 10 monatojn... Jes, dektri jaroj. Antaŭe nia urbo havis pli da vivo...“

Prenu, por ekzemplo, la vesperojn kun la celo de bonfarado. Kiaj vesperoj estis antaŭe! Oni kantis, oni ludis, oni legis. Post la milito, kiam tie ĉi estis kaptitaj turkoj, Anjo faris unu vesperon por la profito de vunditaj. Oni kolektis pli ol mil rublojn. Turkaj oficiroj estis ravitaj per la voĉo de Anjo kaj ĉiam kisis siajn manojn. Tio ĉi estis en 1876, aŭ ne . . . en 1877. jaro . . . Sed kiam estis tie ĉi kaptitaj turkoj? Anjo, kian aĝon havas nia Kola?"

„Mi havas 7 jarojn, mia patro!“ parolas Kola, la knabo kun la bruna vizaĝo kaj nigraj, kiel karbo, haroj.

„Jes, ni fariĝis jam maljunaj, ni perdis energion,“ konsentas Lópnev kun ĝemo. Jen la kaŭzo . . . la maljuneco . . . Novaj iniciatoroj ne ekzistas, kaj antaŭaj fariĝis maljunaj. Ne ekzistas jam la antaŭa fajro. Kiam mi estis pli juna, mi ne suferis, ke la societo enuu. Mi estis ĉefa helpanto de

via Anna Pávlovna. Se estis bezona aranĝi vesperon kun la celo de bonfarado, aŭ loterion, aŭ subteni alveturintan gloran homon, mi ĵetis ĉiujn aferojn kaj komencis klopodi. En unu vintro mi tiel multe klopodis, ke mi eĉ fariĝis malsana. Mi neniam forgesos tiun ĉi vintron. Ĉu vi memoras, kian spektaklon ni aranĝis kun Anna Pavlovna por la profito de suferintaj de brulego?"

„En kiu jaro tio ĉi okazis?"

„Ne tre antaŭ longa tempo, en 1879 aŭ en 1880. Kian aĝon havas via Vanja?"

„Kvin jarojn,“ diras el la kabineto Anna Pavlovna.

„Sekve, tio ĉi estis antaŭ 6 jaroj. Jes, mia bona, estis la aferoj. Nun estas jam alie: la antaŭa fajro ne ekzistas.

Lopnev kaj Šaramíkin profundigis en siajn pensojn. La bruletantaj lignoj ekflamas lastan fojon kaj kovriĝas per cindro.

Tradukis

V. Laskin.

HUMORAĴO.

Konsciencia atestanto. — Pri la afero, estimata sinjor' juĝisto, mi povas diri, ke Ludoviko diris al Sigismundo: „ekzekutinda fripono“. Poste Sigismundo prenis bastonon kaj li per ĝi tiel batis Ludovikon sur kapo, ke li tuj defalis kaj lian kapon sango ekkovris; sed mi ne vidis, ke la bato trafis aŭ ne, ĉar mi tiam ekfumis je pipo.

Kurioza preseeraro. „Rememoru, karega fraŭlino, la vesperon (vesperon), kiun mi tiel amplene pasigis (pasigis) ĉe via flanko.“

La francaj katoj. — Patrino, ĉu estas vere, ke la francoj elparolas la vokalon kunmetitan „kiel o?"

— Jes, flineto.

— Estas do io stranga, ke la katoj en Francujo diras „mio“-n.

Agrabla rememoro. — Agrabla rememoro ligas min al tiu ĉi loko.

— Kio okazis tie ĉi?

— Oni tie ĉi sciigis min pri la morto de mia bopatrino.

Klarigo. — Kiu estas tiu homo, kun kiu vi ĵus interparolis?

— Ho, tiu homo skribis jam treege multe da malsaĝaĵoj.

— Vere? . . . ĉu li estas eble ĵurnalisto?

— Ne, li estas stenografisto en la parlamentejo.

Tempoŝparo. Profesoro de la historio diras en la fernejo:

— Kion mi ĵus rakontis al vi, karaj studentoj, tio okazis en sesdek sep. Mi diris mallongige „sesdek sep“, anstataŭ „en la jaro mil okcent sesdek sep“, por ŝpari iom da tempo.

Pèdelen Diel.

Turmentaj demandoj.

Kiam la ĥino fariĝas virino?

(Kiam la ĥino fariĝas virino?)

Kiel oni ŝanĝas zorgon je amuzo per transporto de l' signo de akcento? (Kiel ŝanĝi?)

Kia litero estas plej potenca en la Esperanta alfabeto?

(Kia litero estas plej potenca en la Esperanta alfabeto?)

S. Poljanskij.

Humoro senokupatula. Policisto renkontas du senokupatulojn sur la strato.

— Kie vi loĝas? — li demandas la unuan.

— Nenie.

— Kaj vi? — li sin turnas al la alia.

— Je unu etaĝo pli alte.

Tr. J. J. Silsmuth.

NUBO KAJ STELO.

— De PETÓFL. —

Kiam Dio ekkreis la viron,
Lia frunto eknebuliĝis, —
El tiu ĉi nebulo la nubo
Kaj la fulmotondro fariĝis.

Kiam Li ekkreis la virinon,
Li faligis larmojn pro la ĝoj',
La gutoj de tiuj eĉ nun estas
Videblaj: la brilantaj steloj.

Tradukis

Paul de Lengyel.



Aforismoj de Kuzma Prutkov.

El lingvo rusa tradukis V. TACIEVSKI.

Rigardu en la radikon.

*

Unua paŝo de infano estas unua paŝo
al ĝia morto.

*

La morto estas metita en la fino
de l' vivo por tio, ke oni pli oportune al
ĝi pretiĝus.

*

Daŭrigi ridon estas pli facile ol fi-
nigi ĝin.

*

Kie estas la komenco de tiu fino, per
kiu finiĝas la komenco?

Malvirtoj enestas en la kunmeteco
de virto, simile kiel venenaj ŝtofoj estas
en la kunmeteco de sanigaj rimedoj.

*

Se ĉio pasinta estus nuna, kaj la nuna
estus ekzistonta paralele je l' estonta; kiu
povus analizi: kie estas kaŭzoj kaj kie
sekvoj?

*

Rigardu malproksimen — vi ekvidos
la malproksimon; rigardu la ĉielon —
vi ekvidos la ĉielon; sed ekrigardinte en
etan spegulon — vi ekvidos nur vin.

AVIZO.

Nia gazeto, komencante de la paĝo sekvanta (157), estos presata en nova presejo. (Vidu pri tio ĉi la anoncon sur la paĝo 172.) La malfruon de tiu ĉi numero kaŭzis tio, ke nia presejo ricevis iom malfrue la akcentitajn literojn (ĉ, ĝ, ĵ, ŝ, ŝ) por Esperanto.

La Administracio.

La frenezulo de la Sankta Virgulino.

Rakonto de Stefano Bársony.

I.

Tomaso *Rano* entuziasme enkuris tra la pordo en la ĉambro de Gabrielo *Tardi* kaj, dume li trakuris tra la antaŭĉambro, li kriis per sia grinca tono:

— Mi ektrovis, Gabrielo! Mi ektrovis!

Tomaso Rano estis apenaŭ kvinfuta alta, sed kiam li tiel flugante kuregis, li ŝajnis preskaŭ efektiva homo. Lia longa haro, per kiu li afektis artiston, flirtis; liaj malgrandaj okuloj dissemis fajrerojn; lia tuta ekzistaĵo estis elŝanĝita, — sole lia ĝibo restis sensanĝe en ĝia prozeco. Ekscite li faletis en unu kadro, renversis unu eluzitan pentristan aparaton kaj subite li enestis en la pentrejo, en kies mezo junulo staris kun peniko kaj paletro en siaj manoj.

Se li ne estus tiel ekscitiĝinta, li estus tuj rimarkinta, ke li nun ne estas gasto bonveninta. Lia amiko estis tre konfuzita kaj lia rigardo falis ĉiam al unu angulo kurtenigita; antaŭ li staris ekkomencita pentraĵo, kiun li subite kovris, kiam Tomaso envenis.

— Mi ektrovis! — kriis la ĝibulo refoje kaj sin ĵetis en la kolon de Gabrielo, kiu provis delikate kontraŭstari.

— Ho, amiko mia, — balbutis Tomaso, kiaj figuroj! kia anĝela vizaĝo! unu sanktiĝinta Venero! Via estonteco estas ekfondita!

Gabrielo Tardi amike prenis la brakon de Tomaso, lin sidigis en apogseĝon, poste li mem sidigis.

— Mi scias... vi trovis modelon por mia »Madono«. Bravulo, vi...

De tiu ĉi laŭdeto Tomaso treege ekĝojis; li sentis, kvazaŭ li estus jam malavare rekomencita. Li ekprenis la manon de sia amiko

kaj dume li ĝin konstante premadis, li rakontis la aferon.

Li vidis sinjorinon, — aŭ ŝi eble estis knabino. Li scias nur tiom, ke ŝi estas la belulino de belulinoj. Kia haro! kvazaŭ ora rivero fluus al la tero de sur ŝia kapo! Kaj la okuloj! tiuj violbluaj steloj! ilia sola ekvido faras poeto la homon.

Gabrielo Tardi nur ridetis. Li ordigis siajn belajn lipharojn kaj sekrete ekrigardis al la angulo, kie la kovrita pentraĵo staris.

— Mi tre estimas vin, Tomaso, kaj mi estas danka pro via fervoro, sed vi nun malfruiĝis...

Ha, tio ĉi ne estas ebla! Ili serĉas ja de monatoj efektivan modelon, per kiu ili povu superigi Rafaelon, kaj jen, nun li malfruiĝis. Tomaso kvazaŭ paliĝis pro la surpriza teruro; en la unua momento li pensis ke lia amiko frenezigiĝis.

La ĝibulo tre malĝojiĝis. Jen, denova io tia, kiu apartenas al lia tragedio.

Ankaŭ en li brulis iam la entuziasmo pro la pentreco kaj li provis fariĝi pentristo. Liaj gepatroj estis riĉegaj homoj, ili oferis ĉion en la intereso de sia filo, sed vane, — li ne estis talentulo.

Tamen la sopiro lin tiris al la pentro, tial li elektis al si amiko Gabrielon Tardi. Tomaso treege amis tiun ĉi junulon, el kiu — por tiel diri — elradiiĝis la dia fajrero. Li fariĝis lia konstanta akompananto, helpanto.

Nun li ektrovis la plej belfiguran modelon, kian Dio iam kreis. Gabrielo intencis pentri Madonon. Nu, ŝi estas vere efektiva Madono! Li ektrovis ŝin preskaŭ senokaze. Kiam li ma-

tene foriris el sia hejmo, ŝi veturis peter li en fiakro. La piedoj de Tomaso kvazaŭ enradikiĝis en la teron je unu sekundo, poste li subite malsveniĝis kaj komencis kuri post la vidaĵo. Kiel frenezulo li kuregis por atingi la fiakron, — en la granda ekscito ne venis en lian cerbon la penso, sin sidigi en alian fiakron kaj postveturi, per kio li estus ŝin atinginta. Tial ŝi baldaŭ malaperis. Li nenion scias pri ŝi: nek la nomon, nek ŝian loĝejon, sed li penados laŭ sia tuta forto sciigi pri ĉio. Kaj, se ŝi estus grafino aŭ eĉ princino, li ĵetus sin antaŭ ŝiajn piedojn, tiamaniere li petegus ŝin, ke ŝi aldonu sian belecon por la superba vizaĝo de l' Dipatrino . . . Ha! kaj estas nun jam malfrue, oni ne bezonas ŝin, ne . . . Sed kial ne?

La malgranda ĝibulo tute raŭkiĝis dume li kriante rakontis tion ĉi. Kaŭzis al li doloron, ke Gabrielo tiel trankvile ridetas dum lia entuziasmoplena rakonto.

Gabrielo Tardi nun starigis, kaptis amike la manon de Tomaso kaj mallaŭte diris al li:

— Mia karega Tomaso, mi havas jam la Madonon. Se vi havus eĉ dek vivojn, vi ne estus kapabla trovi sian similulinon. Pardonu al mi, ke mi havis sekreton antaŭ vi; mi volis, ke via plezuro estu des pli granda, — alvenu kaj rigardu.

Kaj li altiris al la pentraĵo kovrita Tomason Rano, kiu kiel vivanta signo de demando atendis la malleviĝon de l' kovra tolo. Kaj jen, sur la pentraĵo ridetis la Madono, kun ĉiela amo, kun kia la Dipatrino povas ĉirkaŭpreni la tutan mondon.

La vizaĝo de l' pentristo radiiĝis, liaj lipoj tremis, fanfaraona fiereco plenigis lian koron kaj ekkriis:

— Rigardu! Rigardu!

Tomaso ne povis respondi. Li aŭdigis malfacilan spiron. Mire li rigardis la duonprentan pentraĵon, liajn longajn, maldikajn fingrojn

li premis al sia frunto kaj murmuretis ion en sia spirito.

— Ĉu ne vere, Tomaso? — diris Gabrielo, rompante la silenton.

Sed la ĝibulo senmove rigardis la pentraĵon, longe, longe . . . Poste li subite ekkriis:

— Tiu ĉi estas ŝi, Gabrielo! . . . ŝi, mia Madono, mia belegulino! . . .

Kaj dume la du feliĉuloj ĉirkaŭprenis unu la alian, moviĝis la malluma kurteno en la angulo, kaj de tie, kiel neĝblanka spirito, kiu venis sur la teron kiel ĉiela senditulino, elpaŝis la Madono konsistanta el viando kaj sango. La sunradio kvazaŭ eksonoriĝis sur la eroj de ŝiaj orkoloraj haroj balaantaj la teron; en la rideto de ŝiaj violokuloj ne ekzistis peka sopiro je io tera; en la plenaĵo de ŝia blanka vizaĝo floris ruĝo de antaŭmateno, kaj la flirto de ŝia vestaĵo disigis delikatecon de sunorienta venteto.

Tomaso ŝanceliris al ŝi, li surgenuis antaŭ ŝi kaj kisis ŝian manon kun adoro religia.

Poste Gabrielo rapidegiris al ŝi, ĉirkaŭprenis ŝin apogantan la kapon al lia brusto kaj kisis ŝiajn lipojn amplene . . .

II.

De tiu ĉi tago Tomaso Rano ne havis plu trankvilon. — Antaŭe li estis gaja, bonhumora kaj li ne hontis fari mokon el sia propra stranga figuro, — sed nun li malĝojiĝis, kiam liaj amikoj kaj kolegoj ŝerce aludis je lia ĝibo kaj je liaj longaj oreloj. Oftajn fojojn li starigis antaŭ la spegulo kaj kun maldolĉa muteco li rigardis la malnormalan homon, kiu tiel malĝojege rigardis lin el la spegulo. Malvolonte, sed tamen volonte li vizitis Gabrielon, ĉe kiu li longege rigardadis la Madono-pentraĵon, — kiu per la peniko de l' pentristo ĉiam kaj ĉiam fariĝis pli kaj pli plena, — kaj la Madonon konsistantan el viando kaj sango, kiu alvenis ĉiun tagon . . .

Fine la pentraĵo estis preta kaj oni liveris ĝin al galerio. La tutan landon altiris al si la mirinda beleco de l' pentrita Madono, — la homoj venadis preĝi al ĝi kaj la artamantoj efektive bataladis pro ĝia havo.

Gabrielo Tardi naĝis en gloro kaj pensis, ke li ja havas sian modelon, li povas pretigi la pentraĵon ankoraŭ fojon, — kaj li donacis la pentraĵon al unu granda preĝejo.

Post tiu ĉi tempo Tomaso fariĝis preskaŭ duonfreneza; li ne faris alian, ke li kuradis la tutan tagon supren kaj reen sur la ŝtuparo de Gabrielo, atendante senpacience la alvenon de Madono. — Lia korpo, kvazaŭ ombro, nerimarkeble glitadis tien ĉi kaj tien, kaj Gabrielo jam kutimis lin ekvidi ofte sur tia loko, sur kia li malpleje pensis.

Unu fojon, kiam Madono vizitis Gabrielon, ĉeestis ankaŭ la ĝibulo. Kiel kato, senbrue li enŝteliĝis en la ĉambron de l' juna pentristo. La du homaj ekzistadoj, kiuj, ĉirkaŭprenante kaj kisadante unu la alian, ĝuis la mielon de l' amo, nur tiam eksciis, ke ili ne estas solaj, kiam la ĝibulo alkuris al Gabrielo kaj tiel grande lin puŝis, ke li ŝanceliĝis. Poste li komencis krii, ke oni lin trompas kaj ke li ne havas plu eĉ amikon.

Madono kovris per vualo sian ruĝiĝintan vizaĝon, sur kiu lasis postsignojn la sigelo de la amo, kaj ŝi forkuris.

Gabrielo do restis sola kun Tomaso. Delikate li demandis la kompatindulon:

— Ĉu vi estas malsana, mia kara Tomaso?

Li silentis kelkajn minutojn. Poste li subite ekkriis malespere:

— Ĉu mi estas malsana? kaj vi demandas tion ĉi? . . . Aŭskultu, Gabrielo, — mi tre amis vin, mi eĉ nun vin amas, sed vi ne havas la rajton min mokadi nur tial, ĉar mi estas tiel senfigura . . . mi diras al vi tion ĉi, — mi malpermesas al vi tion ĉi, Gabrielo!

— Kara mia, — respondis la junulo trankvile kaj afable, — mi ja ne mokadas vin. Alvenu, sidigu apud mi kaj diru al mi sincere, kio premas vian koron.

Tomaso Rano nun subite elparolis:

— Gabrielo, mi amas tiun ĉi knabinon.

La pentristo ne kuraĝis levi siajn okulojn al la vizaĝo de lia amiko. Li sentis, ke lia konsolo estus plej granda mensogo, hipokrito kaj perfido. En la tuta mondo ja li estas la sola homo, kies instigo estus la plej kruela turmento.

— Jes, mi amas ŝin, — daŭrigis la ĝibulo. — Ĉu ne vere, Gabrielo, mi estas granda frenezulo? Sed, ho, kia feliĉiga estas tiu ĉi dolĉa penso!

Li ekĝemis kaj aldonis:

— Amiko mia, diru, ĉu vi pensas, ke ŝi edziniĝus je mi?

Malvarmiĝis la sango en Gabrielo. Kion li nun respondu? . . . Sed rapide li konfesis al si, ke estus malsaĝa jaluzeco timi *tian* kontraŭulon. Tamen li ne volis maldolĉigi la koron de sia amiko, kaj tial li respondis, ke »tio ĉi povus okazi.«

Post longa parolado pri tiu ĉi afero Tomaso iris hejmen kaj tuj skribis leteron al Madono:

»Atestimata Fraŭlino! Mi estas malbela ĝibulo, sed mi havas dudekmilflorenan jarprofiton. Mi bone scias, ke virino ne povas min reami, sed, se vi volus edziniĝi je mi, vi havus miajn ĉiujn havaĵojn kaj mi neniam estos je via malagrabeco.«

Li surskribis la leteron kaj aldonis en postskribo:

»La dubo min frenezigus; — kion ajn, sed tuj respondu.«

Kaj li sendis la leteron al la adresatino per la lakeo, kiu post duonhoro alportis la respondon.

En sia tuta ekzisto tremis la ĝibulo, kiam li prenis la leteron. Je unu tuta horo li ne kuraĝis ĝin malfermi, timante de ĝia ebla neiga

esto. Fine ĝia bonodoro malsobrigis lin kaj subite disŝiris la koverton.

Kiam li enrigardis, lian koron la sango plensutis; li ekkriegis, kvazaŭ li intencis venki la tutan mondon.

La respondo konsistis el unu sola vorto:

„Jes!“

La dudekmilflorena jarprofito depezis la ĝibon en la pezilo. — — — — —

Kiam la alian tagon Gabrielo Tardi sciigis pri la afero kaj legis per siaj propraj okuloj la teruregan vorton, li ekridegis kaj pensis en sia spirito:

— Tio ĉi ne povas esti vera!

Li elatendis la foriron de Tomaso kaj post tio li tuj skribis leteron al Madono:

»Mia kara Amantino! Kial vi faras mokajon el Tomaso kompatinda?«

Baldaŭ li ricevis respondon:

»Mi ne estas plu via amantino kaj mi ne faras mokajon el Tomaso kompatinda.«

Dika, blua vejno elsidiĝis sur la tempion de Gabrielo kaj li sentis, ke fajreraj flamoj detruas lian kranion. Post kvaronhoro li mirege ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ li estus en fremda loko. Li prenis la paletron kaj penikon kaj rompis ilin, li neniigis la pentrilojn, li faris truon per siaj piedoj sur duonpreta pentraĵo, — poste li prenis ĉapelon kaj foriris.

Li neniam plu revenis.

III.

»Ite missa est«

La lasta akordo de la orgeno transkuras kun melodia sonoro la solenan silenton de l' didomo, kaj la eĥo de l' ritmoj de la ĥoro flirtas inter la pentritaj anĝeloj.

La paŝoj de l' forirantoj el la preĝejo debalaas la farunpolvon de l' marmorkvadratoj, kiu kiel ora nebulo flirtas inter la ludantaj sunradioj; superba silento en la regno de l' religio.

La preĝeservanto malbruligas la kandelojn sur la altaro, nur la eterna flamo brulas plu. Poste li zorge esploras la preĝejon: ĉu ne estas iu ankoraŭ en ĝi.

Nenie, neniu. Sole antaŭ la altaro de la Sankta Virgulino genuflekse preĝas blankhara homo. Jen li klinas sin kaj tiam liaj longaj haroj desegnas maldikajn streketojn en la polvon, jen li rigide rigardas la belegan pentraĵon estantan super la altaro, je kies admiro homoj venas tien ĉi eĉ el malproksimaj landoj.

Malsovaĝe ridetas la ĉielinspira vizaĝo de la Sankta Virgulino, — en siaj profundaj, bluaj okuloj brile-brilas la kredo, espero kaj amo. Kiu vidas tiun ĉi pentraĵon, komprenas la perfektecon de la Difilo, se tia virino donis al Li la vivon.

La blankharulo tiel kortusante preĝas al ŝi, ĝis lin la preĝeservanto forsendas:

— Restariĝu, Gabrielo, por hodiaŭ estis jam sufiĉa, — ankaŭ morgaŭ estos tago. Jam krias la *ranidoj*.

La homo malklare balbutas:

— Jes, sinjoro . . . vi estas prava . . . ankaŭ morgaŭ estos tago . . . Kaj la Ranidoj, ho, ve al mi, la Ranidoj . . .

Terure li elkuras el la preĝejo. Sur la strato infanoj kuras post li kaj krias:

— Jen Gabrielo, tie ĉi estas Gabrielo, la frenezulo de la Sankta Virgulino!

En la urbo ĉiu konas lin; ĉiu scias pri li, ke li havas nur unu ĝojon: tiun grandan, belegan pentraĵon super la altaro de la Sankta Virgulino. Antaŭ ĝi li preĝas genuflekse ĉiun tagon de mateno ĝis vespero. Li ploras al ĝi, li petegas ĝin, li parolas, rakontas al ĝi, tial oni nomas lin »frenezulo de la Sankta Virgulino«. Li estas silenta frenezulo; neniu scias, kiu li estas, — jam de multaj jaroj li nutras sian mizeran vivon per tiuj almozoj, kiujn la preĝejirantoj donadas al li. Nur tion li ne povas

toleri, se oni lin rememorigas je la ranidoj. Tion ĉi li ne povas elporti. Dolore li ekkrias tiam :
— Estas io terurega, kiam la Ranidoj krias . . .

La Madono konsistanta el viando kaj sango jam antaŭ longe trograsiĝis, nenio el la ideala estas sur ŝi plu. En sia vilaĝa so-

leco sia unu amata sinokupo estas : ĉagrenisian edzon, Tomason Rano.

Kaj, krom tio, la kompatinda ĝibulo havas sufiĉe multe da malagrablaj minutoj kun la Ranidoj, kiuj multe pli laŭte kriadas, ol iliaj »kolegoj« loĝantaj sur la bordo de l'rivereto, — kaj kiuj senfine malĝojigas la patron per tio, ke ili ĉiuj rajdas sur lia ĝibo.

Mallongige la hungaran originalon tradukis

Paul de Lengyel.



Letero al la Redakcio de la „Lingvo Internacia“.

Estimata Sinjoro Redaktoro !

Mi petas Vin presi en plej proksima numero de »L. I.« tiun ĉi leteron de malnova fervora esperantisto.

Abonantĉi nian gazeton dum 8 jaroj, mi ĉiam ricevadis ĉiun novan kajeron kun plej viva ĝojo, bone sciante, ke ĝia enhavo estas freŝa kaj interesa ; tiel estadis ĝis fino de 1898 jaro, kiu estis la lasta bona jaro por nia gazeto, ĉar post ĝi »L. I.« ja mortis. Vere, la gazeto denove aperigiĝis nun, en tiu ĉi jaro, sed kun granda bedaŭro oni devas konstati, ke ĝi reviviĝis nur per sia nomo, — per nenio alia . . . Kaj nun, ricevante novan kajeron, mi ne sentas jam ĝojon, kiel en pasintaj jaroj, kontraŭe, mi sentas doloron kaj eĉ akran ĉagrenon, ĉar mi konvinkiĝis jam, ke ĉiu nova kajero de nia nuna gazeto estas pli kaj pli malinteresa.

Tiun ĉi malĝojan fakton oni povas klarigi per tio, ke dum antaŭaj jaroj la gazeton subtenadis per sia kunlaborado tiaj lumiloj de l'esperantista rondeto, kiel nia glora ĉefo d-ro Zamenhof, s-roj Gernet, Kofman, Devjatnin, V. Langlet kaj aliaj. Dume nun, en nova »L. I.« kunlaboras esperantistoj tute nekonataj, ĉe kiuj eĉ sub mikroskopo estas maleble trovi fajron da talento. Dum antaŭaj jaroj la abonantoj ricevadis la gazeton akurate, ili povis legi efektive seriozajn artikolojn, talente verkitaĵojn aŭ tradukitaĵojn rakontojn kaj belegajn melodiajn versaĵojn. Kaj nun

ni ricevas aŭgustan kajeron nur en novembro kaj devas legi fabelojn pri tio, kiel elkreskis rostro ĉe elefantido, renkontadi preskaŭ sur ĉiu paĝo tiaj malpiaj perloj, kiel ekzemple »sen ke li povus« (kaj similaj »senkeliecoj«), aŭ rompadi sian kapon per solvo de tiaj malfacilaj rebusoj, kiujn tuj solvus eĉ kvinjara infaneto . . .

Kaj tia estas la enhavo de la sola presa organo de serioza homa rondeto, kiu celas tian grandan, helan ideon, kiel Esperanto kaj ĝia disvastigado !

Ne estas do mirinde, ke la nombro de abonantoj de l'nuna »L. I.« pli kaj pli malgrandiĝas, ĉar ekzistas tre malmultaj personoj, kiuj abonadus gazeton nur laŭ principo.

Jus mi ricevis la aŭgustan kajeron, en kiu s-ro Rakitski esprimas sian opinion, ke ni devas kiel eble plej multe reklami Esperanton. Kredeble s-ro R. forgesis, aŭ eĉ tute ne scias, ke d-ro Zamenhof ĉiam estis kontraŭ ia ajn reklamo pri Esperanto. Kaj d-ro Zamenhof estas tute prava, ĉar ĉiu saĝa honesta homoj latas al reklamo kun tre komprenebla males-timeto, dume kredas al ĝi nur homoj malseriozaj aŭ deirantaj reklami sin mem. Ŝajnas al mi, ke ni, veraj esperantistoj, ne devas tro avidi je akiro de tiuj ĉi lastaj personoj en nian rondeton.

Se la nombro de veraj esperantistoj estas ne tiom granda, kiel tio ĉi estus dezirate, — la kaŭzo dependas ne de tio, ke la homoj ne scias pri Esperanto, sed tial, ke ili postulas

antaŭ ĉio pruvon de ĝia taŭgeco. Mi mem ofte aŭdis tian frazon: »se Esperanto estus efektive bona lingvo kaj utila, ĝi havus sian literaturon; ĉar sen literaturo lingvo ne estas lingvo.« Kaj kiam mi montradis al tiuj ĉi personoj nian antaŭan gazeton aŭ tradukon de »Hamleto«, »Kain«, »Demono«, »Iliado« kaj aliaj, — ili ne havis kion kontraŭdiri kaj tuj komencadis rilati al Esperanto multe pli estime. Kaj nun per kio ni povas respondi je similaj kontraŭdiroj de skeptikoj? Estas ja honte konfesi al fremdaj homoj, ke nia literaturo nun . . . regresas; kaj certe ne per la nuna »L. I.« ni povas pruvi kontraŭan, des pli, ke sendube baldaŭ »L. I.« tute ĉesos sian ekzistadon: ja ĝi progrese havas pli kaj pli malmulte da abonantoj, dume nenia gazeto povas ekzisti sen ili.

Tial, por ke havi eblecon vivi kaj plenumadi sian gravan antaŭdifinon, nia gazeto devas ne reklami sin, sed esti serioza, interesa kaj akurata je sia elirado. Pri akurateco devas zorgi la administranto de l'gazeto, dume ĝia plibonigo de enhavo estas atingebla nur en tia okazo, se la malnovaj kunlaborantoj, kiujn mi ĵus nomis, forĵetos sian strangan malvarmiĝon (mi ne scias kiel supozi alie) al Esperanto kaj venos je helpo per siaj talentaj plumoj. Mi ne dubas, ke ili volos tiel agi, ĉar sen ilia helpo la gazeto mortos eble jam por ĉiam . . . Kaj ĉu ne mortos kun ĝi nia afero mem? . . .

Oni devas pensi pri tiu ĉi minaca ebleco.

S. Petersburgo, 1/14. novembro 1900.

A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

Rimarko de la Redakcio. — Ni ne volas rifuzi al ni la plezuron fari unu kaj alian rimarkon kaŭze de la diroj, kiujn faris en sia letero la estimata kaj alte ŝatata aŭtorino.

Ĉiu afero homa havas du flankojn, unu bonan, unu alian nebonan. La alia flanko de nia gazeto estas ĝiaj mankoj, el kiuj ĝi havas multajn.

Sed nia gazeto posedas unu grandegan meriton: ĝi *ekzistas*.

Tiuj, kiuj mem donis iom da sia tempo al la propagando esperantista kaj speciale al la gazeto, povos kompreni, ke, se oni akcelas nur sian altan plezuron, oni baldaŭ laciĝos. La nuna redaktoro certe ne laciĝis je tiu ĉi laboro, sed li havas ankaŭ aliajn devojn, alian laboron, kiuj konsumas liajn fortojn kaj okupadas lian tempon. Li tamen faris kaj faras ĉion, kion li povas: li donis la denaron de la vidvino. Ĉu tio estas tro malmulte?

Oni diras, ke la gazeto mortis! Kaj tion ĉi oni diras per viva voĉo en la vivanta gazeto mem! Ni havas grandan respekton por la vivo kaj la morto, kaj ne ekzekutas facilanime ekzistaĵon ian. Tian saman respekton ni postulas de la flanko de niaj kunhomoj.

La estimata kritikantino ne vidas talenton ĉe la nunaj kunlaborantoj en »L. I.« Tion ĉi ni ne povas helpi. Eble ŝi mem povos pli bone kaj pli komprene vidi, se ŝi formetu la mikroskopon kaj rigardu per siaj naturaj okuloj. Se oni volas vidi homon, kaj tutan homon, la mikroskopo absolute ne estas la ĝusta instrumento.

Ni miras, ke eĉ ne taŭgas unu el la plej gloraj verkistoj de la nuntempo — Rudyard Kipling . . .

La malpia perlo »sen ke li povus« estas nek malpia, ĉar ĝi estas tute indiferenta de la religio, nek perlo, ĉar ĝi estas nur ordinara pinglo por praktike kunfortikigi du frazojn unu kun la alia. Oni diras tion ĉi france: *sans qu' il pût*, itale: *senza ch' egli potesse*, hispane: *sin que él pudiese*, germane: *ohne dass er könnte*, svede: *utan att han kunde*, hungare: *a nélkül hogy tudná*.

Eble la rebusoj povus esti pli sagacaj, sed ankaŭ la infanecaj aferoj havas sian intereson. Vidu en la Evangelio (Mateo, ĉapitron 18: 3).

Pri tio, kio estas dirita pri la evitindeco de reklamo, ni tute konsentas, konvinkitaj, ke la esperantistoj devas ĉiam agi per la plej granda mezuro da seriozece kaj gardemeco en la propagando.

La Redakcio.



ANKORAŬ PRI LA VERBIGILO *i*.

(Respondo al l' artikolo de s-ro *L. de Beaufront* »L. I.« 1900/8.)

Respondante l' artikolon de l' estiminda s-ro *L. de Beaufront*, por pli klare analizi la traktatan demandon, mi kalkulas oportuna rimarkigi jam en la komenco, ke tiu ĉi punkto tuŝas nenimaniere ian esencaĵon de Esperanto: kiel ajn oni opinius pri la verbigo de adjektivoj per la finaĵo *i*, de l' solvo de tiu ĉi demando dependas nenia grava aŭ malgrava negulo de nia lingvo. La nun konsiderata kaj proponata formo, laŭ mia opinio, havas rajton ekzisti, jen ĉio.

Antaŭ ĉio mi devas klarigi ke en mia lasta artikolo mi »falsis« nenie ian diron de s-ro de Beaufront, eĉ »senintence«, kiel li sin esprimas. S-ro de Beaufront skribas: »Mi neniam pretendis ke solaj la radikvortoj adjektivaj, kiujn mi citis, povas fariĝi verboj«. Sed kie do mi diris, ke s-ro de Beaufront preteadas tion, kvankam por tion ĉi diri mi havis la plenan rajton? Efektive, en la artikolo de s-ro de Beaufront estas nenie dirate ke, krom la cititaj de li 5 adjektivoj »kuraĝ, avid, egal, avar, util«, ekzistas ankoraŭ aliaj de tiu ĉi kategorio. Jen la teksto: »Ekster la radikvortoj, tradukitaj verbe en la vortaro Esperanta, kiuj pro sia naturo mem fariĝas verboj per la simpla aldono de *as, is, os* k. t. p., ekzistas tre malmultaj radikvortoj, kiuj povas fariĝi verboj per tia simpla aldono. Ŝajnas al mi ke nur »kuraĝ, avid, egal, avar, util« (plue sekvas neadjektivaj radikoj), kiuj eniras en tiun ĉi kategorion... (p. 49). Sekve, se mi estus dirinte ke s-ro de Beaufront privilegias nur 5 adjektivojn, mi nenion estus falsinte. Sed en mia artikolo (»L. I. 1900, p. 75) mi faris eĉ la kontraŭon: anstataŭ citi la diritajn 5 adjektivojn, mi prezentis 4 kaj, enloke de la kvina, mi metis l' abreviaturon »k. c.« (*kaj cetere*).

La lasta, kiel sciante, anstataŭas nedifinan nombron da vortoj, kaj sekve, de tro precizama homo mi povus pli atendeble ricevi riproĉon por tiu ĉi vastiga »kajceterigo«. La riproĉo venis tamen en senco tute kontraŭa, kvazaŭ l' esprimo »k. c.« estus limigilo, ne vastigilo. Jen la historio pri mia falso, dolĉigita de l' epiteto »senintence«.

Al tio ĉi aliĝas dua kulpigo. En mia artikolo mi diris: »En l' *Espérantiste* de majo 1900 mi trovas l' adjektivojn »kuraĝ, avid, egal, avar« k. c., kiuj laŭ l' opinio de l' aŭtoro (de s-ro de Beaufront) tre bone povas fariĝi verboj per la simpla aldono de *as, is* k. c. al la respondantaj radikoj, kaj tiuj ĉi verboj signifas laŭ la konfeso de l' aŭtoro, »esti kuraĝa, esti avida« k. c. Kontraŭ tio ĉi s-ro de Beaufront, en »L. I.« 1900/8, klarigas ke »kuraĝi« signifas ne »esti kuraĝa«, sed »havi la kuraĝon de...«, »avidi« signifas ne »esti avida«, sed »havi la plej grandan deziron de...«, »egali« ne signifas »esti egala«, sed ĝi estas verbo de ago kaj sencidenta al la franca verbo *s'égaler*, kaj same »avari« ne signifas »esti avara«. Tiamaniere mi estas denove kulpigita. S-ro de Beaufront diras: »Ni estas devigita diri, ke lia (t. e. mia) memoro tute malfidele servas al li: ni parolis plene alie kaj neniam diris ke »kuraĝi« k. c. signifas »esti kuraĝa«. Ni tradukis la cititajn verbojn same kiel ni ĵus faris tie ĉi.«

Estinte leginte tion ĉi, mi okaze ekrigardis l' unuan linion de la paĝo 50^a de l' *Espérantiste*, kiu kuŝis antaŭ mi kaj mi estis kiel de tondro frapita! Efektive, mi tie legis: »Ili (la radikoj) donas »kuraĝi« havi la kuraĝon fari tion ĉi aŭ tion...« Sekve, mia memoro efektive estis malfidela! Sekve mi efektive

alskribis al s-ro de Beaufront ion, kion li ne diris! Certege, tia eraro de mia flanko estis nur okaza malfeliĉo, ĉar la tuta afero ne dependis de tio, kion pri kelkaj adjektivoj diris mia kontraŭulo, bonkore jam nominta mian falson »senintenca«. Mia opinio pri la signifo de l' konsiderataj verboj apogas sin ne sur l' artikolo de s-ro de Beaufront, sed sur alia fakto, kio troviĝas ekstere de tiu ĉi artikolo. Tamen la dua kulpigo, kvankam ne decidanta la demandon, min maltrankviligis. Kulpigo post kulpigo! Kion do pensos pri mi la mondo de Esperantistoj?

Kaj jen, denove levinte l' okulojn sur la fatalan paĝon 50-an, mi subite ekvidis mirindaĵon! La cititan linion sekvis io alia, scie: »Ili donas *kuraĝi* havi la kuraĝon fari tion ĉi aŭ tion; *avidi esti* avida je . . . (ekz. *avidi* gloron); *egali esti* egala je . . .; *avari esti* avara je . . . (ekz. : ne avaru vian penon); *furiozi esti* en la stato de furiozeco . . .« Dank' al Dio, mi ne estas tro kulpa! Se mi faris unu eraron rilate fremdan certigon, kiam mi diris ke s-ro de Beaufront egaligis *kuraĝi* al *esti kuraĝa*, s-ro de Beaufront faris kvar erarojn rilate sian propran certigon, kiam li diris ke li ne egaligis *avidi* al *esti avida* k. c., kaj tamen li tion ĉi faris!

Tiu ĉi historio pri »li tion diris« kaj »mi tion ne diris« estas sufiĉe enua, sed oni komprenos, ke mi tute ne havas la deziron aperi antaŭ la mondo Esperanta en rolo de falsifikatoro, se eĉ la kulpiganto estas tia talentulo, kiel s-ro de Beaufront. Mia defendo finita, mi iras al l' afero.

Ĉu s-ro de Beaufront privilegias nur 5 adjektivojn, ekster la donitaj de l' vortaro de d-ro Zamenhof, aŭ iom pli, tio ĉi estas ne grava: li ĉiam privilegias »tre malmultajn« (*l' Espérantiste* 1900, p. 49), kaj la tuta demando, antaŭ ĉio, estas: ĉu nur kelkaj adjektivoj povas verbiĝi, kaj se jes, kia estas la kaŭzo de tia privilegio? Tiun ĉi demandon

s-ro de Beaufront ne solvis, kaj mi pensas ke ĝi ne estas solvebla en senco alia ol ĝin montras mia artikolo. La demando pri la signifo de l' dirataj verboj estas aparta punkto, konsiderata sube.

Citante mian frazon, kiu konfesas, ke nenie, nek en la lernolibro de d-ro Zamenhof, nek alie mi trovis formalan diron ke *i* havas la signifon *esti*, s-ro de Beaufront diras ke tiu ĉi konfeso ŝajne pravas ke mi sentas iom da malfirmeco en mia certigo. Tiu ĉi klarigo ne kunpunktiĝas kun mia. Tiu ĉi konfeso simple konstatas ke l' egaligo *i = estas* prezentas mian *konkludon*, *mian propran konkludon*, tiritan el la konsidero pri la verboj »*kuraĝi*, *egali*, *rapidi*« k. c., kiujn mi trovis ĉe d-ro Zamenhof. Kio koncernas la rimarkon de s-ro de Beaufront, kiun li nomas fundamento de sia argumentado, ĝi estas korekta, sed ne plena. S-ro de Beaufront diras: »tiu ĉi fundamento estas la certigo sekvanta: *i*, *as*, *is* k. c. estas nur signoj de tempo kaj de modo, sed per si mem ili ne donas al ĉiuj radikoj la senco de verbo, esprimanta la agon, la staton aŭ la senco. Tiu ĉi signifo venas propre el la intima senco donita de la radikvorto, sed ne propre el la verbaj finiĝoj, kiujn mi citis.« Ke la finaĵoj verbaj, *per si mem*, ne donas al *radikoj* tian senco, mi bone scias, sed same bone mi scias ke la radikoj »*kuraĝ*« aŭ »*avid*« siavice entenas nenian ideon pri »havo de kuraĝo« aŭ »havo de avido«, dum la verboj »*kuraĝi*« kaj »*avidi*« ricevas, laŭ la nova opinio de s-ro de Beaufront, la senco »havi kuraĝon, havi avidon«. Mi ankoraŭ preparolos la »diferencon« inter *havi kuraĝon* kaj *esti kuraĝa*, sed dume prezentiĝas jena sekreto. La radikoj *kuraĝ*, *per si mem*, enhavas nenian ideon pri »havi«, la finaĵo *i*, *per si mem*, kiel oni diras, ankaŭ ne. Kiel do tiu ĉi ideo subite venas al la verbo *kuraĝi*? La sekreto certe klariĝas per tio, ke tiun ĉi ideon donas al la radikoj la verba finaĵo, aŭ, pli

precize, la verba finaĵo donas tiun ĉi signifon al la tuta kombinaĵo, kiu konsistas el radiko kaj tiu verba finaĵo. Sur tiu ĉi eco fondiĝas la tuta vortaro Esperanta. La radiko »pied« esprimas nenian »manieron«, sed »piede« jes; la radiko »akv« ne enhavas la ideon de »verŝo de akvo«, sed la kombinaĵo »akvi« enhavas ĝin; la radiko »ter« enkompreneblas nenian nuancon de »aparteno«, sed la kunaĵo »tera« enkompreneblas ĝin (ekz. tera akso); la radiko »gast« montras nek personon, nek manieron, nek agon, nek apartenon aparte, alie la kompleksoj »gasto, gaste, gastis, gasta«.

Tiu ĉi rimarko pri la finaĵoj *a, o, e, i* kaj radikoj estas sufiĉa por montri ke l' intima signifo de radikoj efektive restas »intima«, t. e. kaŝita de ĉies okuloj kaj oreloj ĝis kiam aliĝas konvena finaĵo. En kelkaj okazoj, precipe se la radikoj estas ne-adjektivaj, nesperta esperantisto povas eĉ ŝanceliĝi en l' opinio, kian sencon havas tiu aŭ alia vorto: sed kiam la radiko estas adjektiva, t. e. apartenas al parto de parolo, kiu ĉiam montras staton aŭ econ, la demando solviĝas plej facile. Ĉar la vortoj »blanka, blanke, blanko«, kion ajn ili signifus, ĉiam signifas staton aŭ econ, mi vidas nenian kaŭzon, kial »blanki« (se tiu ĉi verbo ne estas elpelita el la nombro de »elektitaj«) ne signifus »esti blanka«. La rimarko de s-ro de Beaufront ke la finaĵoj *i, as, is* k. c. esprimas nur tempon kaj modon, tute ne kontraŭdiras al tiu ĉi konkludo. Por ke la kombinaĵo »blanki« signifu »esti blanka«, estas necese kaj sufiĉe ke »blank« esprimu staton aŭ econ kaj ke *i* estu finaĵo de l' infinitivo. Kun la radiko »manĝ« la afero estas alia, ne sole ĉar d-ro Zamenhof diris formale ke manĝi = preni al si nutraĵon, sed pro la objektiva fakto ke la radiko »manĝ« ne estas radiko adjektiva. Sekve el mia opinio ke blanki = esti blanka, tute ne sekvas la konkludo ke manĝi = esti manĝo.

Kiel dirite, la konkludo *i = esti* estas tirita el verboj de stato aŭ de eco, sekve se

oni ĝin volas almeti al ne-adjektivaj radikoj, la lastaj devas esti prezentitaj en formo de responda stato aŭ eco. Tio ĉi estas farebla facile. En ĉia lingvo la frazoj »mi estas kapabla, mi estas feliĉa« signifas »mi estas en eco kapabla, mi estas en stato feliĉa, sed ne »mi estas eco kapabla, mi estas stato feliĉa«. Sekve, se mi konstruas l' egalajon »mi feliĉas = mi estas en stato feliĉa«, mi devas ankaŭ, por esti logika, meti »mi manĝas = mi estas en stato manĝanta«, aŭ, pli simple, »mi estas manĝanta«. *) Sub tiu ĉi formo oni povas prezenti ĉian verbon, de kia ajn radiko ĝi venus. Mi devas nur rimarkigi ke la finaĵo *a* ne egalas je *anta* (komparu: dorma ĉambro, dormanta homo; bana kostumo, banata infano; viva lingvo, vivantaj bestoj; danca arto, dancanta knabo). Tio ĉi estas ordinara diferenco inter adjektivo kaj participo.

Se la dirito estas justa, ĝi plene alkonformiĝas al la radikoj »advokat, oficir, parazit, tiran, patrol, spion, virtuo, muzikist« k. c., ĉar kion ajn signifus la *a*-formoj, *e*-formoj, *o*-formoj de tiuj ĉi radikoj, ili ĉiam montras staton, econ aŭ uzon de tiu ĉi eco. En la rusa-esperanta vortaro de d-ro Zamenhof mi trovas la sekvantajn verbojn de tiu ĉi speco: friponi (p. 7), amisti (p. 21), gastis (p. 34), arlekenadi (p. 44), filozofii (p. 217), dandi (p. 229). S-ro de Beaufront diras: »Hodiaŭ mi demandas, kion ĝuste signifus la diritaj finiĝoj en *li advokatus, mi oficiras?* la staton, la profesion aŭ la ekzercon mem de la profesio? Ĉu *mi nun advokatus* signifos *mi nun estas advokato* aŭ *nun mi ekzercas, mi praktikas mian profesion de advokato* parolante por mia kliento? Per unu vorto ĉu *advokati* kaj la vortoj similaj esprimas la staton aŭ la agon? . . . La unua (sekvo)

*) Kiu diras ke el mia egalajo sekvas ke »mi manĝas = mi estas manĝo«, tiu faras saman eraron kiel se li dirus ke el tiu ĉi egalajo sekvas ke »mi estas en stato feliĉa = mi estas stato feliĉa«.

estas, kiel ni ĵus diris, ke samaj finiĝoj donas al unu radiko la signifon de verbo stata, kaj al alia, la signifon de verbo fara. Kaj fakto pli grava, kiel ni ĵus vidis, en multaj okazoj oni devas ŝanceliĝi inter la du signifoj por la sama verbo.*

Al tiuj ĉi demandoj mi respondas ke la verbo *li advokatus* signifas kaj staton kaj profesion kaj ekzercon mem; ke tiuj ĉi stato, profesio kaj ekzerco estas reciproke, interne kaj ne-disigeble ligitaj unu kun l' alia; ke *li advokatus* signifas *li estas advokato* kaj la vorto *advokato* esprimas samtempe staton, rangon aŭ kvaliton de certa homo, kiu havas certan profesion ekzercatan kaj ekzercon; — fine, ke se iu ŝanceliĝas inter la signifoj de l' verbo *advokati*, li ŝanceliĝas same inter la signifoj *esti advokato*.

Ankoraŭ pli. L' esprimo »mi estas advokato« havas ankoraŭ figuran aŭ metaforan sencon. »Mi estis advokato por li antaŭ la generalo« signifas ke mi klopodis por li, mi defendis, senkulpigis lin antaŭ la generalo. En tiu ĉi senco la radiko »advokat« havas novan sencon, ĝi plu ne esprimas profesion aŭ konstantan okupadon, tamen neniu, legonte tiun frazon, estos kondukita en eraron. Sed saman diras ankaŭ la verbo *advokati*. »Mi advokatis por li antaŭ la generalo« estas sama kio la supredirita frazo. Ambaŭ frazoj estas rajtegalaj en sia ekzisto, ambaŭ estas klaraj, kaj unu — pli mallonga.

Dirinte ke mi vidas nenian kaŭzon kial oni ne povus uzi l' abreviaturon *i, as, anta* en izola formo, anstataŭ *esti, estas, estanta*, mi elmontris nenion mallogikan kaj strangan. En mia lasta artikolo mi jam citis ekzemplon kiu mi trovis en »L. I.« kaj kiu prezentas tiun ĉi formon izola kaj l'e ligita al radiko. Nun mi prezentas rimarkon de M. Pierre Larousse: »Il n' existe, à proprement parler, qu' un seul verbe, c' est être; on le nomme „verbe substantif“, parce qu' il existe, parce

qu' il subsiste par lui-même, indépendamment de l' attribut. Tous les autres verbes renferment l' idée de l' affirmation et l' idée de l' attribut, et se nomment, pour cette raison, „verbes attributifs“. Ainsi, dans la proposition *le soleil brille*, dont le sens est *le soleil est brillant*, le verbe *brille* équivaut à *est* (signe de l' affirmation), et *brillant* (attribut).« (*Grammaire supérieure, 3-e année, ed. 13-e, p. 76.*)

La saman, ankoraŭ pli klare, diras alia specialisto. »Das Verbum, deutsch Zustands-, Aussage- oder zumeist Zeitwort genannt, enthält das von dem Subjekt Ausgesagte, es bezeichnet den Zustand, in welchem das Subjekt sich befindet etc. Da jedem Zustand die Existenz, das Sein zu Grunde liegt, ohne welches eben kein Zustand gedacht werden kann, so ist *sein* das Grundverbum, welches das Subjekt mit dem Predikat verbindet, sei dies letztere nur ein eigenes Wort für sich oder **sei es mit dem Grundverbum zu einem selbständigen Aussagewort verschmolzen**, z. B. Karl (Subjekt) dient (Verbum) — ist (Grundverbum, Kopula) dienend (Prädikat) oder: ist (Kopula) Soldat; vergl.: die Wiese grünt, ist grürend, ist grün, der Vater schläft, ist schlafend etc.« (*Wörterbuch der Hauptschwierigkeiten in der deutschen Sprache von Professor Dr. Daniel Sanders, 21. Auflage, Berlin 1891, p. 54.*)

Tiamaniere, laŭ l' opinio de l' cititaj aŭtoroj, la verbo *esti* prezentas fundamentan verbon kaj, propradire, la solan verbon, kiu ekzistas. Sen ĝi ni havus nenian alian verbon: en ĉia alia verbo, laŭ la profesoro Sanders, al kiu ne kontraŭdiras s-ro Larousse, la verbo *esti* estas »kunfandiĝinta« kun responde radiko. Se tiel, ĉu estas strange konstrui la egalajon *i = esti* kaj disligi l' elementon *i* de ĝia kombinaĵo en la supredirita senco, uzante l' izolajn formon »mi as, mi is« k. c.?

Kontraŭ tiu ĉi konkludo, s-ro de Beaufront diras: »Per la fakto, se *i* signifas *esti*,

tiu ĉi lasta verbo kun siaj nunaj formoj devas esti forlasita. Logike ni devas diri ne *mi estas, estis, estos*, sed *mi as, mi is, mi os, mi is inta, mi os inta* k. t. p. Al kio tia ekstremaĵo? Se *i* signifas *esti*, el tio ĉi tute ne elfluas ke la verbo »*esti*« kun ĉiuj siaj nunaj formoj **devas** esti forlasita: ĝi povas resti, kaj la sekvo estos ke, anstataŭ unu formon *esti, estas* k. c. ni havos ankorau alian formon *i, as* k. c., formon mallongan.

Nun mi venas al tiu parto de l' artikolo de s-ro de Beaufront, kie li analizas la *signifon* de verboj »*rapidi, lami, kuraĝi, ruzi*« k. c.

Rapidi, laŭ l' opinio de s-ro de Beaufront, signifas ne »*esti rapida*«, sed iri, agi, marŝi rapide, ekz.: li rapidis hejmen; rapidu fini vian laboron; se vi ne rapidos, vi ne alvenos ĝustatempe. — Sed kiamaniere tiuj ĉi ekzemploj malsubtenas mian diron? Ĉu oni ne povas same bone diri: estu rapida al hejmo, estu rapida kun la fino de via laboro, se vi ne estos rapida, vi ne venos ĝustatempe? Tion ĉi oni eble ne povas diri france aŭ germane, ĉar la lingvoj »*vivaj*« havas siajn konstantajn, rigidajn kaj mortajn formojn, kiuj volas esti tiaj kaj ne aliaj. Sed en Esperanto ĉio, kio estas komprenate, estas bone.

Lami, laŭ s-ro de Beaufront, signifas ne »*esti lama*«, sed marŝi kiel lamulo, ĉar, diras li, pro ia okaza kaŭzo, oni tre bone povas lami, kvankam feliĉe oni ne estas lamulo. Sekve la diferenco, laŭ s-ro de Beaufront, inter »*lami*« kaj »*esti lama*« konsistas en tio ke la vorto »*lama*« estas adjektivo, kaj kiel tia, ĝi montras econ aŭ staton konstantan, dum verbo, ligita kun tempoj, montras okazan aperon: hieraŭ l' apero estis, morgaŭ ĝi plu ne estos. Tio ĉi estas vero (vidu supre mian rimarkon pri la diferenco inter adjektivoj kaj participoj), sed tia miksaĵo da nuancoj, sen konfuzigi la legantojn de kia ajn nacio, efektiviĝas sur ĉia paŝo en ĉia lingvo, kaj neniu plendas pri tio. »Mi naĝas, mi legas germa-

najn librojn, mi erpas la teron« signifas »mi naĝas nun, aŭ mi naĝas ĝenerale, mi scias naĝi; mi legas nun, aŭ mi legas ĝenerale, mi scias legi; mi erpas nun, aŭ mi estas erpisto.« (Vidu kion mi diris pri »advokati«.) Tiamaniere unu formo estas uzata por esprimi okazan kaj ĉiaman aperon. Tiel sur nia malperfekta tero l' eterneco profaniĝas ĝis la grado de okazeco, kaj l' okazo fanfaronas esti eterna.

Kuraĝi signifas laŭ s-ro de Beaufront, havi kuraĝon, sed ne »*esti kuraĝa*«, alie (klarigas li, oni ne povus diri: mi ne kuraĝas tion ĉi fari. — La diferencon inter »*esti kuraĝa*« kaj »*havi kuraĝon*«, inter »*mi ne kuraĝas tion ĉi fari*« kaj »*mi ne estas kuraĝa tion ĉi fari*« tian diferencon mi ne komprenas same kiel la diferencon inter »*mi havas malvarmon*« (*j' ai froid*) kaj mi estas malvarma (*I am cold*); inter »*mi havas malsaton*« (*j' ai faim*) kaj »*mi estas malsata*« (*ich bin hungrig*).

Avidi. Same. — La rimarko de s-ro de Beaufront ke tiu ĉi verbo ĉiam ricevas almenaŭ plenigon de unu vorto, tiras per si mem nenian apartan sekvon. La duvorta verbo »*esti avara*« troviĝas en la sama pozicio.

D-ro Zamenhof ŝajne ankaŭ ne vidas la diratan diferencon. La rusan verbon *derzati*, kiu signifas »*elmontri kuraĝon, aroganton*«, la d-ro tradukas per »*esti kuraĝa, esti aroganta*« (p. 38), kaj la rusa-franca vortaro de Makarov (la plej bona, kiu ekzistas) tradukas la saman verbon per *oser, hasarder, pendre la liberté*. Nu, s-ro de Beaufront volas ke kuraĝi = *oser*. Erge?

La rusan verbon *opazdyvatj*, kiu signifas »*veni tro malfrue*« (laŭ Makarov *arriver trop tard, être en retard*), s-ro Zamenhof tradukas per »*malfrui*« (p. 120). Kie do restas en Esperanto la diferenco inter *arriver trop tard* kaj *être en retard*?

La verbon *kiĉtjsja*, kiu signifas »*elmontri fierecon*« (laŭ Makarov *s' enorgueillir*,

être fier de) dr-o Zamenhof tradukas per »esti fiera« (p. 73).

Tion ĉi oni povas trovi ankaŭ en aliaj lingvoj. Komparu ekzemple la sekvantajn francajn verbojn kun la anglaj:

<i>aimer</i> (ami)	<i>to be fond of, to love, to be in love</i>
<i>désirer</i> (deziri)	<i>to be desirous of, to desire</i>
<i>se taire</i> (silenti)	<i>to be silent, to remain silent</i>
<i>dormir</i> (dormi)	<i>to be asleep, to sleep</i>
<i>avoir peur</i> (timi)	<i>to be afraid, to be in fear, to fear</i>
<i>s' étonner</i> (miri)	<i>to be astonished, to be amazed, to wonder</i>
<i>se fâcher</i> (koleri)	<i>to be angry</i>
<i>sentir</i> (senti)	<i>to be sensible, to have a sense of.</i>

Se oni diros ke Esperanto ne devas esti gvidata de aliaj lingvoj, mi rimarkigos ke ĝi fakte jam estas gvidata de ili, kaj tio ĉi estos ĉiam. Se la proponata formo estas malbonaŭo aŭ eĉ maloportunaŭo, — jen la sola kondiĉo ke ĝi ne ekzistu. Sed tio ĉi ne estas pruvebla.

La fakto ke en mia lasta artikolo mi jam estis dirinta: »Etendante la diriton sur ĉiujn adjektivojn, mi rimarkigos, ke ĉar diversaj adjektivoj esprimas diversajn ideojn: staton, econ, kuron aŭ movon (tamen ĉiam staton aŭ econ), iliaj verboj ricevas apartajn nuancojn, kiuj dependas de la radiko: kuraĝi = esti kuraĝa, sin montri kuraĝa, sin distingi per kuraĝeco, montri kuraĝon k. c. . . . Por ĉia adjektivo kaj por ĉia aparta okazo unu nuanco estas pli densa ol alia. . . . tiu ĉi fakto montras ke mi antaŭe sciis ke la nuancoj de l' verbo »kuraĝi« ne prezentas malhelpon por donaci al Esperanto amason da novaj verboj el la materiao jam ekzistanta. Ke »ruzĉi, ĵaluzĉi, utili, obstinĉi« havu tian kaj alian nuancon: la tuta frazo ĉiam montros, kion la skribanto volas. Sed apud tiuj verboj ni havos ankoraŭ pli grandan amason da aliaj, kiel

»verdi, feliĉi, malfrui, varmi k. c. (Vidu la frazeologion en »L. I.« 1896/12.)

Mia respondo al l' artikolo de s-ro de Beaufront estas propradire finita. Restas ankoraŭ unu pli aŭ malpli interesa rimarko de li, kiun mi pensas esti oportuna por esti respondita. Post lia rimarko ke »sani« ne signifas »esti sana« (ruse tiu ĉi verbo signifas »esti sana, esti en saneco« = *être en bonne santé*, kaj Makarov ĝin tradukas france per *se porter bien*), s-ro de Beaufront diras:

»Se *i* signifas *esti* en ĉiuj verboj enhavantaj radikvorton adjektive tradukitan en la vortaro Esperanta, kion do povus signifi tiu finiĝo en ĉiuj aliaj verboj senfine pli multaj? Kredeble kaj eĉ sendube *i*, *as*, *is* k. c. havas unu solan saman sencon en ĉiuj verboj de la lingvo; en ĉiuj ili signifas *esti*, *estas*, *estis* k. c. Oni ja ne povas supozi ke, ne avertinte nin, la aŭtoro donis tian valoron al al tiuj finiĝoj en unu verbo kaj ian diferencon en alia. La logiko tion ĉi ne povas akcepti. Sed tuj unua strangaŭo aperas; ripeto de la sama ideo de estado en ĉiuj personoj de l' verbo *esti*. Efektive, ĉe la teorio de s-ro Kofman, la ideo de estado troviĝas unu fojon en la radikvorto *est*, kaj duan fojon en la finiĝo *i*, *as*, *is* k. c. Pli forta strangaŭo aperas en la verboj pasivaj, ĉar en ili la ideo de estado troviĝas tri fojojn: du fojojn en la vorto *esti*, unu fojon en la participo (*ata*, *ita* aŭ *ota*). Vere, ĉu tio ĉi estas akceptebla?»

Kia ĉeno da surprizoj! Unue, mia tuta artikolo estas dediĉita al adjektivaj radikoj ke, sekve, mi per tio ĉi diras ke *i* = *esti* en aparta kategorio de verboj, kies radikoj, kion ajn ili signifus, esprimas ideon de stato aŭ de eco, aŭ — mi ripetas ĝiu en formo pli preciza — *i* = *esti* en la kunaĵo »adjektiva radiko *i*«; sekve, se eĉ *i* ne signifus *esti*, la tuta verbo, la tuta kunaĵo havas tiun ĉi signifon. Due, ne sole en tiaj verboj, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj *i* = *esti* (*sidi* = *esti* en stato

nomata sido, kuri = esti en stato de moviĝo nomata kuro, manĝi = esti en stato aŭ ago nomata manĝo, manĝado). Trie, la ripeto de la sama ideo de estado estas ajo tute ne mirinda: tiu ĉi ripeto aperas en ĉiu lingvo. En *je suis tombé* la ideo de esto aperas en *suis* kaj en *tombé*. Kiam s-ro de Beaufront uzas en Esperanto la formon »mi estis estinta, mi estos estinta, mi estus estinta« k. c. (Commentaires sur la grammaire k. c., p. 53) li ankoraŭ restas en sia dualismo. Mia propra kulpo sekve konsistas nur en tio ke mi toleras la Triecon.

Dankante la leganton, kiu havis la paciencon legi tian longan kaj eble enuan artikolon, kies kvarono, cetere, estas skribita por min defari de maljustaj kulpigoj, mi rimarkigos ankoraŭ ke vane l' estiminda s-ro de Beaufront

rapidas »kain'igi« min, bruligante sur mian frunton la sigelon: jen estas arogantulo, kiu ne volas diri kun d-ro Zamenhof »mi estas kuraĝa« k. c. Da tiaj »kainoj« povas troviĝi en Esperanto tre multe, kaj inter ili eĉ »la unua esperantisto«. Kio koncernas la rimarkon de s-ro de Beaufront, ke li estus ĉagrenita, se li per sia opinio pri la verbigado kaŭzus al mi malĝojon, — mi miavice konfesas, ke mi ankaŭ estus tre ĉagrenita, se miaj pensoj pri la verbigilo *i* estus malagraba al s-ro de Beaufront, nia kara apostolo de Esperanto. Mi firme kredas ke tiu ĉi abstrakta temo, kiu neniel tuŝas ian regulon de Esperanto, ankaŭ ne tuŝos personecojn kaj havos pli feliĉan solvon ol alia demando, jam disputita sur la paĝoj de »L. I.«

A. Kofman.



DIVERSAJ OJ.

Adresaro de niaj abonantoj 1900.

(Daŭrigo.)

Anglujo:

335. British Museum, Departement of printed books, en London W. C.

Aŭstrujo:

332. Čejka Theodor, instruisto, en Bystřice pod Hostýnem (Moravujo).
339. Fr-ino Julie Šídlo, en Bystřice pod Hostýnem (Moravujo).
342. Valentin Bílík, instruisto, en Znorovy u Veselí n. m. (Moravujo).
358. Dr. Max Zimmermann, en Innsbruck, Andreas Hoferstrasse N^o 1, II. St. (Tirol).

Bulgarujo:

353. Koljn Wanĉev, en Stanimaka.

Francujo:

338. Fr-ino Alice Roux, en Paris, 27, avenue Duquesne.
344. Léon Beau, en Dijon, 6. rue St. Martin.
346. Elbèr No, (2-a ekz., — N^o 137).
354. Comtesse Amicie de Villaret, 8, rue des Grands-Oiseaux, en Orléans.
355. A. Carles, rue des Balances 3, en Beziers, Hérault.

Germanujo:

- 333—334. W. H. Trompeter, en Rellinghausen b/ Essen, a/d Ruhr, Westfalen.

Mongol-Hinujo:

331. N. P. Evstiféieff, Comptoir de Mr. Victor von Grot, à Urga (via Moscou-Irkutsk).

Rusujo:

- 336 Nikolaj Miĥajloviĉ Studenov, Reniskaja ul. 45, en Kiŝinev, Bessarabskoj gubern.

337. A. A. Sosnickij, lesnoj revizor, en s. Kovda, Arkalgelskoj gub.
 340. A. Elfimov, »Russkij Standard«, en Groznij, Terskoj obl.
 341. M. F. Agafonov, Torgovij dom I. E. Kitajev i Sin, en Astrakan.
 343. Ivan Ivanoviĉ Zdanoviĉ, imjenie Soĥa, en st. Ĥruŝĉevo, Rjazansko-Uralskoj ŝel. dor.
 345. Aleksandr Vasiljeviĉ Plusnin, en Ĥabarovsk (Sibirio Orienta).
 347. P. Bulwicz, katolika pastro, en Blagovjeŝĉensk, Amurskoj obl.
 348. Port-Arthur, Asio Orienta, — Manĵurskaja doroga inĝeniero Nikolaj Kazy-Girej.
 349. Kremenec, Volynskoj gubern. jenskaja gimnazija, — Mankovskoj.
 350. Moskva, Samoteka, Meblirovannyja komnaty v dom. Birinkova Szamszevu.
 351. Avilov, učitel (instruisto), Pervaja gimnazija, en Tiflis.
 359. St.-Pĕtersbourg, Anglijskij prospekt fabrika Bormana, — Terentĵef.

Svedujo:

352. S-rino Louise Fraenckel, Ilseheim, en Djursholm.
 356. Pastro K. O. Svanbom, en Björklinge.
 357. Fil. kand. Valdemar Langlet, en Stockholm, Arsenalsgatan 2. A.

Ŝanĝitaj adresoj:

60. L. de Makay, en Eger, Szalóky-út 22. szám (Hungarujo).
 134. V. Tacievski, agento de Esperanto, en Odessa (Rusujo).
 139—140. Jos. Socha, princa bienadjunkto, en Wilfersdorf pr. Mistelbach (Mals. Aŭstr.)
 191 (nun 273). K. Tripolski, en Ĉervonnoe de gub. Volinskaja Vinokurenni zavod (Rus.)
 210. V. Rogaĉev-Antonov, en Moskva, Gazetnij per. uĝol. Tverskoj meblitaj ĉambroj »Serbia« (Rusujo).
 217. Rolf Nordenstreng, magistro de l' filozofio, en Upsala. St. Johannsgatan 10 (Sved.)
 248. Friedr. Brych, mil. subintend. en Wilten, (Tirol), Andreas Hoferstrasse Nº 2.
 261. A. Caetano Coutinho, en S. José d' Alem Parahyba, Minas Geraes (Brazilio).
 282. Waclaw Woyde, en Hamburg, Hansaplatz 6. I. (Germanujo).

314. K. Boguŝeviĉ, en Stavropol, Kavkazski, Hospitalnaja ul., dom. Rozanova (Rus.)
 321. Ivan Brusell, en Dresden, ĉe E. Steintchen, Georgsplatz Nº 8.
 323. J. Holub, instruisto, en Louĉka, bei Neutitschein (Moravujo).

ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO.

En sia artikolo »Naturaj esperantistoj«, presita en aŭgusta numero de »L. I.«, s-ro Rakitski parolas pri ne sufiĉe granda anonca reklamigo de nia lingvo, dank' al kio naturaj esperantistoj ne povas ekkoni ĝin kaj fariĝi varmegaj anoj de nia ligo. Sendube la manko de presaj informoj en nia afero estas tre bedaŭrinda, tamen ŝajnas al mi, ke ĝi estas pli bona, ol vasta anoncado en gazetoj, pri kiu parolas s-ro R. — Al tia afero, kiel estas nia lingvo Esperanto, granda kaj laŭta anoncado povas alporti utilon por vendado de esperantaj libroj, dume, kontraŭe, ĝi povas malhelpi al la afero mem, ĉar en nuna tempo jam preskaŭ ĉiu homo estas tiom sperta, ke li ne kredas al reklamo, nomante ĝin »friponeco« kaj, dank' al tia reklamigo, nia lingvo, kiu ja tute ne estas *entrepreno*, povas perdi sian bonan reputacion. Krom tio, reklamo, pri kiu parolas s-ro R., devas ja esti pagata, tial, mi pensas, ĝi estas tute maloportuna por esperantistoj kaj kredeble laŭ tiu ĉi kaŭzo — ĝi mankas. Tamen, konfesante, la utilon de presaj informoj por nia afero de propagando, mi proponas al esperantistoj atingi tiun ĉi celon per artikoloj presitaj en naciaj gazetoj. Tiu ĉi rimedo konatigi publikon kun nia ideo estas pli bona kaj facile atingebla. Ĝi ne postulas monan elspezon kaj tial ĉiu esperantisto povas esti utila en tiu ĉi okazo. Ĉio el ni povas skribi kaj meti en gazetojn aŭ ĵurnalojn de sia urbo artikolojn pri Esperanto rimarkojn k. t. s. Se sin trovus esperantistoj al kiuj ne estas facile verki artikolojn, al tiuj povas helpi niaj antaŭaj gazetoj »Esperantisto« kaj »L. I.« donante materialon aŭ simple modelojn de artikoloj, ĉar bedaŭrinde nuna »L. I.« mem estas tro malforta por tiu ĉi celo.

Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi rimedo estas plej bona kaj oportuna por atingi nian celon — konatigi publikon kun nia lingvo kaj varbi verajn esperantistojn.

W. Winnicki de Hujd.

== **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino, kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ malfacilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rimedojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Leterojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson, »Longcott«, Gunnersbury, London, W.*

Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi kun esperantistoj kaj esperantistoj, precipe el Germanujo aŭ Aŭstr.-Hungarujo: elektro-teknikisto Aleksandro Prager, en Moskvo (Rusujo), Gruzinskij Val. d. Denisov.

Mi deziras kolekti ilustritajn poŝtkartojn de la eksterlandaro; tial mi petas tiujn inter la esperantistoj kaj esperantistoj, kiuj havas similan deziron: ili volu sin kompleze turni al mi per tia poŝtkarto. — Mia adreso: »Ludoviko Mihalovich (oficisto), en Szegzárd,« Hungarujo.



Rebusoj.

I. De Nitetin.

- 1-a silabo: Jen estas prepozicio, —
- 2-3-a sil.: Montras agon aŭ econ;
- 1-3-a sil.: Kaj la tuta vort' esprimas De l' nacioj saĝecon.

II. De N. Studenov.

	a-	La			nu	Kom-		
an,	tra-	gva	la	to,	nan-	da-	u-	
lin-	po-	li-	neŭ-	fun-	loj	ko-	pre-	
	sen-	la	po-	le-	men-	te		
		*Sur	to	fa-	ta			
		kon-	ga-	nu	fa-			
	ca	U-	ros	En	an.	gen-		
ro	en	ro	ci-	mi-	gran-	don	di-	
ne	ĝos.	pa-	la-	Ni-	li-	li-	dan	
	bo-	la-			ron-	a		

Solvota laŭ ĉevaliro. Steleto signifas la komencon.

III. De N. Studenov.

A A A A Translokigu la literojn tiel, por ke la
 A I I K vortoj, legataj de maldekstre al dekstre
 K O R R kaj de supre al malsupre egaligu unu kun
 R R V V alia. La vortoj devas havi difinitan signifon.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la decembra numero. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomoj de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 6-7: I, Nova surtuto. II. Riveroj superakvintaj.

Solvis la du rebusojn: Fernand Chaufoureau, Waclaw Woyde, Elbér No. Sam, N. Studenov, — unu rebuson: fr-ino Caroline Wieslander, C. Ralčeff, J. J. Süßmuth, Ivan Ŝirjaev, V. Gedroic, Stef. Ĥr. Krokodilov kaj I. E. Moskovčenko.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 8: I. Saturno. II. Saturno. III. Saturno.

Solvis: Fern. Chaufoureau, Ludoviko Mihalovich, N. Studenov, Sam, fr-ino Caroline Wieslander, Nitetin, V. Gedroic, N. Pavlovskij, J. J. Süßmuth, Jos. Jamin, I. E. Moskovčenko, Stef. Ĥr. Krokodilov, K. Sidlovski.

En la antaŭa n-ro ni erare presis, ke sinjoro Elbér No solvis nur unu rebuson, — ĉar li solvis ambaŭ. Cetere s-ro N. Pavlovskij ensendis la solvon de la tiala dua rebuso.

A N O N C O J.

Signetojn Esperantistajn

mi pretigas nun nur el arĝento kaj kostas la ekz. rubl. 1.50 sen transsendo.

Signetojn el kupro mi ne pretigas pli.

JUVELISTO H. ŜTALBERG

Vezenberg (Estl. gub.) Rusujo.

Kiu deziras el rusaj esperantistoj ion aĉeti en Moskva, sin turnu al esperantisto A. Prager, Moskva, Gruzinskij Val. d. Denisov. Prenante nenian komision, transsendas ĉiajn sciigojn kaj kostotabelojn de Moskvaj firmoj. Nekonataj esperantistoj almetu markon por la respondo.

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa
en Jyväskylä.

Ĉe la **Klubo Esperantista** en *Upsala* estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo *Espero* en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo, de *Paul de Lengyel*. Tre rekomendinda verko, precipe uzbla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 frankoj.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en **Svedujo** ĉe la Klubo Esperantista Upsala, en **Finlando** ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur

kr. 1.— (Fmk. 1:40 p.)

po 100, — al kio sin almetas la poŝtopago.

RESTANTAJ JARKOLEKTOJ de la »Lingvo Internacia« 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. — Kosto: svedaj kronoj 1.50 = frankoj 2.—

Hjalm. Bäckström, Örnsköldsvik (Suède).

Rapida
servo!



Modernaj
literoj!



Bona laboro!



Moderaj
prezoj!



★



Nia gazeto, komencante de la 157-a paĝo de tiu ĉi numero, estos presita en la dirita presejo, kiu cirkonstanco tre grande antaŭhelpas la regulan eliradon de l' gazeto.



Presejo por Esperantistoj
en Szegzárd, Hungarujo

La administranto de la „Lingvo Internacia“ sciigas la legantaron, ke li kompaniigis kun la havanto de granda presejo en Szegzárd.

Leterojn oni adresu al

PAUL DE LENGYEL

Hungarujo.

Szegzárd.

Ni entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presajoj en ĉiuj lingvoj, kiuj uzas latinan (antikvan) aŭ germanan (frakturan) literon.

Ni rekomendas nian servadon precipe al esperantistoj; la presejo posedas literojn akcentitajn por nia lingvo.

